

LA NESIA HEJMO

PERSONOJ

MARIO

EMILIINO

LUDOVIKINO

JOZEF-LUDOVIKO

EMANUELO

JULJANO



La agado en Madrido.—Nuntempa epoko.

JACINTO BENAVENTE

LA NESIA HEJMO

TRIAKTA PROZA KOMEDIO

*Unuafoje prezentita en la Madrida teatro de la Komedio
la 6^{an} de oktobro 1894*

EL LA HISPANA LINGVO KUN PERMESO DE LA
AŬTORO TRADUKIS,

VICENTE INGLADA ORS

Membro de la «Lingva Komitato» kaj Prezidanto de la Valencia
Grupo Esperantista



VALENCIA—1909

TIPOGRAFÍA MODERNA, Á C. DE MIGUEL GIMENO

AKTO UNUA

Eleganta manĝoĉambro ĉe Jozef-Ludoviko.

SCENO UNUA

EMILIINO kaj LUDOVIKINO enirantaj.

EMIL. Ĉu vi diras, ke la mastrino ne malfruos reveni?

LUD. Ne, sinjorino. Ŝi eliris por meso kaj aĉetoj. La dekunua estas tuj sonoronta, horo de la tagmanĝo, kaj vi ja scias la akuratecon de miaj gemastroj.

EMIL. Certe! Ne estas alia pli ordaranĝita hejmo. Tute same, kiel la mia. Kia granda malordeco! Sed provu ordigi kun kvar knabetoj kaj la respondaj servantoj kaj nutristinoj...! Tie ĉi, kompreneble, la sola geedzparo, du servantoj... Vi ja havos nenion por fari.

LUD. Ne estas multe da laboro.

EMIL. Kaj la mastro, ĉu li pli bone fartas?

LUD. Malsanema, kiel ĉiam. La pasintan semajnon li havis unu el siaj malsanatakoj, li restis tre trafrapita; sed de kiam alvenis sinjoro Emanuelo, li ŝajnas iom pli animita.

EMIL. Kiel! Sinjoro Emanuelo alvenis?

- LUD. Jes, sinjorino, antaŭ kvar tagoj.
- EMIL. Jes, oni lin atendis ĉiutage. Sed ŝajnas al mi strange, ke mi ne eksciis pri lia ĉitieloĝado... Mia edzo vidas en la Borso ĉiutage vian mastron kaj estas strange, ke li nenion diris al li pri tio.
- LUD. Mia mastro parolas tiel malmulte...
- EMIL. Kaj, ĉu li venis bonfarta?
- LUD. Jes, sinjorino, tre bonfarta. Ĉu vi ne lin konas?
- EMIL. Li ja migradas de post multaj jaroj... De kiam lia frato estis ankoraŭ needzigitaj; kaj mia konatigeo en tiu ĉi hejmo estas nur pro via mastro Mario. Multe mi aŭdis paroli pri li, pri liaj vojaĝoj, pri liaj aventuroj. Ĉu li similas al sia frato? Oni diras, ke li estas el alia karaktero.
- LUD. Li similas al li per nenio. Li estas tre simpatia, belkreska junulo, tre gaja, tre amema...
- EMIL. Bone, bone! Tiel la hejmo estos pli animita.
- LUD. Jes, sinjorino; kreu ĝin. Estas pli da gajeco, da animiteco... Ha, jen mia mastro. (*Vidante Marion alvenantan. Mario eniras, kiel venante el meso; dum ŝi salutas Emiliinon, Ludovikino demetas al ŝi la mantilon, reprenas la preĝlibron kaj ceterajn aĵojn kaj foriras.*)

SCENO II

EMILIINO kaj MARIO.

- EMIL. Kiel vi fartas, mia kara?
- MAR. Ĉu de longe vi atendas?
- EMIL. Unu momenton. Mi ja scias, ke vi bonfartas, ke via bofrato alvenis.
- MAR. Kaj via edzo kaj geknaboj?

- EMIL. Sanaj, ĉiuj sanaj. Ferdinando tre okupata. Li ja venos kun mi saluti vian bofraton... Vi ape-
naŭ lin konis, ĉu ne vere?
- MAR. Mi konis lin, kiam ni estis infanoj. Vi ja scias,
ke lia familio kaj la mia estis tre intimaj; lia
patro kaj la mia estis samnegocanoj. Sed Ema-
nuelo formigris tiel juna el Hispanujo... Ni ne
atendis lin revidi.
- EMIL. Oni diras, ke en migrado li laborakiris multe
da mono.
- MAR. Granda kapitalo! Li estas tre entreprenema,
ŝanco lin favoris...
- EMIL. Li daŭrigas fraŭle, kompreneble.
- MAR. Kaj laŭ lia aserto, sen intencoj edziĝi.
- EMIL. Maturaĝa viro riĉa kaj needziĝema! Sed vi
kion celas? Vi ne havas indecon, se vi ne rega-
las lin per dekduo da nevoj... se vi ne volas
vin ĝeni, en mia domo estas kvar kaj tie estas
nek mono, nek heredoj perspektive videblaj...
Ĉio iradas bone!
- MAR. Emanuelo estas juna. Kaj figuru al vi, ĉu man-
kos al li profitaj edziĝokazoj.
- EMIL. Tuj kiam oni ekscios en Madrido, oni forkap-
tos lin de vi. Bone iradas la filinhavantaj patri-
noj! La papervaloro «viro» multe prezaltiĝis.
Antaŭe, al ĉiu knabino, pli aŭ malpli bela,
atinginta certan aĝon, ne mankis fianĉo, ĉu
bona aŭ malbona. Ni estis sampreze kotizataj;
sed nun, mia kara, la monŝanĝo leviĝis al la
nuboj. La patrinoj devus ja fari prunteprenan-
don en la fremdolando.
- MAR. Kia spritaĵo!
- EMIL. Kaj kio fariĝas pri via vivo? Ĉu vi abonis la
Reĝan Operon?

- MAR.** Ne. Por kio? La pasintan jaron ni iris tri noktojn dum la tuta prezentadepoko; ĝi estas sencelĵeti la monon. Josef-Ludoviko estas mal-sanema, ne havas bonhumoron, nek deziron sin vesti, ĉio lin lacigas... Vi ja scias, kia li estas.
- EMIL.** Jes... sed, mia kara, via vivado estas tre malgaja... izolitaj inter kvar muroj. Se almenaŭ vi akceptus amikaron.
- MAR.** Al ĉio oni alĉutimiĝas, kaj mi ne estas alĉutiminta multe min amuzi. Vi bone scias tion; ĉe miaj gepatroj same okazis.
- EMIL.** Ĉe viaj gepatroj estis almenaŭ babilrondo ĉiusabate. Oni kartludis, trinkis ĉokoladon, kaj alestis niaj fianĉoj.
- MAR.** Hodiaŭ niaj edzoj.
- EMIL.** Kaj la via estis la unua kaj unika. Vi ĉiam estis tiel serioza! Mi vagflirtadis iom kun tiu Sevilljano, ĉu vi rememoras? Se mi estus edziniĝinta kun li, terura afero! Kian vivadon devis elporti ŝia malfeliĉa edzino! Ni ne povas plendi. Ni trafis malerare.
- MAR.** Oni vidas tiajn malfeliĉajn geedzojn!
- EMIL.** Estas terure... kaj kiom da ili, ŝajne feliĉaj... sed se oni profunden rigardas... Kiaj belaj orelringoj!
- MAR.** Donacitaj de mia bofrato.
- EMIL.** Belegaj perloj! La riĉuloj, mia kara,...
- MAR.** Ho, li alportis al mi mirindaĵojn... Vi vidus...
(*La dekunua batas*).
- EMIL.** La dekunua kaj via edzo ne venis. (*Oni sonorigas*).
- MAR.** Jen li estas. (*Premas sonorilbutonon.*)
- EMIL.** La akurateco mem. (*Fuljano eniras*).
- MAR.** (*Al Fuljano*). Vidu, ĉu sinjoro Emanuelo jam

- leviĝis kaj tuj alportu la tagmanĝon. (*Fuljano eliras. Al Emiliino*). Ĉu vi volas kunmanĝi?
- EMIL. Ne mi foriras kurante. Bone iradus mia hejmo, se mi malestus! Mi venis inviti vin al la teatro. Ni havas loĝion por la hodiaŭa unuafoja prezentado.
- MAR. Mi ne scias, ĉu Jozef-Ludoviko volos, ke ni iru... Mi jam sciigos vin.

SCENO III

LA SAMAJ *kaj* JOZEF-LUDOVIKO

- Joz. Tre bonan tagon.
- EMIL. Vi alvenas ĝustatempe.
- Joz. (*Sidiĝante je la tablo*). Mi iom malfruiĝis. Ĉu vi volas tagmanĝi?
- EMIL. Jesuo! Ĝi ne malvarmiĝu! Estas ĝuste la deknua. Mi volis diri, ke vi alvenas ĝustatempe por akcepti inviton por la hodiaŭa unuafoja teatrludaĵo. Mario ne kuraĝas doni al mi sian akceptvorton, ne kalkulinte kun vi.
- Joz. Kiu ajn diros, ke mi estas tirano.
- EMIL. Vi ne estas tirano. Neniu diras tion. Sed Mario estas ekzempla edzino kaj tre bone plenumas tiujn detalajojn de la edziĝepistolo, kiujn ne ĉiuj akurate respektas... «La edzino ne eliros el hejmo sen permeso de sia edzo.»
- Joz. (*Al Mario*). Ĉu vi volas iri?
- MAR. Se vi venas...
- Joz. Mi ne estas sana. Hodiaŭ min frapis galatako.

- MAR. Ni, do, restos hejme. (*Al Emiliino*). Vi jam ĝin aŭdis.
- EMIL. Nu, oni devas animiĝi. Se vi ne helpas vin distri... Oni diras, ke la hodiaŭvespera komedio estas belega. La teatro estos vidinda... Kompreneble, mi ankaŭ invitas vian fraton, kvankam mi ne havas la plezuron lin koni, kaj akceptu mian gratulon por lia feliĉa alveno. Vi ja dezirus lin revidi.. Ĉu li estas la sola frato, kiun vi havas?
- JOZ. La sola. Ni estis kvar; nur restas la lastenaskita, Emanuelo, kaj mi, la unuenaskita. Nur Emanuelo estis sana kaj fortika en la familio. Ĉu li ankoraŭ ne ellitiĝis?
- MAR. Mi jam diris, ke oni lin avizu.
- JOZ. Kutiminte vivi sola, li ne alkonformiĝas al la familia vivado. Ĉiam li estis tre senmetodviva... Se li malfruas, ni tagmanĝos. Li ja scias, kiom mi ŝatas la akuratecon. La senordeco en manĝoj min mortigas.
- MAR. (*Sonorigas*). Ni tagmanĝu. (*Al Fuljano, kiu eniras*). La tagmanĝon.
- JUL. Sinjoro Emanuelo tuj venos. (*Li eliras pretigi la tablon*).
- EMIL. Mi foriras... Ni, do, kalkulas sur vin?
- MAR. Ne, vi jam vidas, ke Jozef-Ludoviko ne sanas. Atendu momenton, vi ekkonos lian fraton.
- EMIL. Mi sentas scivolon... Mi ne estas tre prezentinda, mi eliris sencere monie vestita.
- MAR. Vi estas intimulo.
- JOZ. Donu al mi la magnezajon.
- MAR. (*Alportante boteleton el la telermeblo*.) Prenu... (*Preparas la ŝaŭmotrinkaĵon*). Sed, ĉu vere vi ne estas sana?

- Joz. (*Malbonhumore*). Vere! Vi eble kredas, ke mia malsano estas, kiel viaj hemikranioj. . Mi estas tre malsana.
- EMIL. Vi tro laboradas. Ĝi estas mia insistecelo pri Ferdinando... Ferdinando estas fortika, sed la avideco pri negocoj, la borso, la Deputatarejo... tio estas senhaltado dum la tuta tago... Almenaŭ li havas kvar gefilojn por kiuj zorgi... sed vi, sola kun via edzineteto... Vi ja devus forlasi la negocojn, ripozadi, vin flegadi, multe amuziĝadi, ĉar la vivo estas mallonga.
- MAR. (*Proponante al li la pokalon*). Ĉu ĝi estas taŭgaranĝita? Ĉu pli da sukero?
- Joz. (*Kolere*). Mi jam ne scias, kion fari, nek kion trinki. Estas malesperige!
- MAR. (*Ameme*). Nu, havu paciencon. Hodiaŭ vi ne eliros el domo.
- Joz. Jes, ĝuste. Malmulte mi havas por fari!
- MAR. Lasu ĝin por alia tago.
- Joz. Ĉu vi kredas, ke miaj aferoj estas tiaj, kiel la viaj?... Vizitoj kaj aĉetoj same fareblaj en kiu ajn horo de kiu ajn tago.
- MAR. (*Kun amema riproĉeto kaj volante lin rimarkigi pri la ĉeesto de Emiliino*). Vi ja famiĝos pro malmilda karaktero.
- EMIL. (*Komprenis kaj volas lertkaŝi*). Kiam oni estas malsana, ĉio malplaĉas. Estas nature.

SCENO IV

LA SAMAJ *kaj* EMANUELO

EMAN. Saluton, gefratoj! (*Vidante Emiliinon*). Sinjorino...

MAR. (*Prezentante unu al la alia*). Mia bofrato Emanuelo... Sinjorino Ordoñez, ĉiama amikino mia...

EMIL. Tre plezure! (*Aparte al Mario*). Li estas tre simpatia.

JUL. (*Alportante la tagmanĝon*). La tagmanĝo.

EMIL. (*Adiaŭdirante*). Ni jam havos la plezuron vin vidi ĉe ni. Sciu, ke vi kalkulas sur novajn geamikojn. (*Al Jozef-Ludoviko*). Vi plibonfartu. (*Al Mario, ŝin kisante*). Adiaŭ, plejkara, ne forgesu iri al mi. (*Eliras*).

SCENO V

MARIO, JOZEF-LUDOVIKO *kaj* EMANUELO, *sidantaj*. LUDOVIKINO *kaj* JULJANO *servas la tagmanĝon*

JOZ. Dank' al Dio! Mi kredis, ke ni ne tagmanĝos.

EMAN. Ĉu vi ne estis komencintaj pro la vizito aŭ min atendente?

MAR. Pro la vizito. (*Al Jozef-Ludoviko vidante, ke li ne prenas por manĝi*). Ĉu vi ne volas ĝin manĝi?

- Joz. Ne. Ĝi estas tre malfacile digestebla. Mi ne kuraĝas.
- MAR. Ĉu vi volas aliaĵon? Ĉu ovon en akvo varmigitan? Ĉu fritsoleaĵon? Kial vi ne diras, kion vi volas? (*Al Emanuelo*). Ĉu vi vidas, kia strangeco? Oni devas diveni liajn pensojn.
- EMAN. Mi konas la sistemon. Vi pasigos la tagon rigardante lin en la vizaĝon por kompreni kion li deziras. Vi certe estas pri fizionomio pli kuintimlerta, ol Lavater mem.
- Joz. (*Malpiaĉigita*). Kiam oni estas malsana kaj, sekve, malbonhumora, mi kredas pli saĝe, ne paroli, ol diri malagrabraĵojn.
- MAR. Multafoje ne estus grave al mi, aŭdi de vi ian malagrabraĵon, se nur mi vin komprenus... Vi estas prava, Emanuelo... ĉiam mi rigardas en lian vizaĝon por diveni al li la pensojn... Sed mi estas tiel malleita... aŭ li tiel malmulte klareprima, ke malofte mi trafas.
- Joz. Mi, do, malmulte parolas?... La plej elokventaj interne, ofte estas la plej silentaj, la malplej klareprimaj... kiel vi diras. Kiuj malmulte pensas, tiuj plej parolas. Ĉar iliaj ideoj estas malmultaj, ili baldaŭ ilin elirigas, kun mirinda fluo... Estas nature! Du aŭ tri personoj, solaj, pli facile pasas tra pordo, ol amaso kunpuŝiganta.
- EMAN. Ĉu tio estas min riproĉnoma parolema? Eble mi estas, ĉar mi pensas malpli ol vi tion, kion mi diras... Sed mi sentas... Kaj kiam mi sentas ion, mi devas ĝin diri... eĉ se ĝi estas malsaĝaĵo aŭ malagrabraĵo.
- MAR. (*Al Fozef-Ludoviko*). Ankaŭ el tio ĉi vi ne manĝas?
- Joz. Mi ne havas apetiton. Kio venas poste?

MAR. Por vi, rostita viando.

EMAN. Sed .. ĉu vi ne bonfartas?... vi nenion manĝas. Mi kontraŭe havas tian apetiton... Mi ekkaptis avidece la hejman manĝadon.

MAR. Ĉu vere ĝi plaĉas al vi? Mi, kiu penas doni al vi manĝi, laŭ hotelsistemo...

EMAN. Nu, mi pli ŝatas valencian rizaĵon, bonan hispanan *kocido'n* kaj eĉ ĝiajn viandbulojn.

JOZ. Jen kiel sanĝiĝas la preferoj! Vi nescias kiom li batalis ĉe ni, kun nia patrino, pro la manĝoj. Tiam, kion li nun trolaŭdas, ĉio ŝajnis al li fikuirajoj kaj li preferis manĝi en kafejo aŭ hotelo.

EMAN. (*Kun malpeza tono apenaŭ tuŝita de ia graveco kaj kortuŝeco; super ĉio oni devas eviti la solenan kaj deklaman tonon*). Ĝi estas la homa esteco. La konstanta spirito ribeleca ekzistanta ĉe nia animo kontraŭ ĉio altrudata, eĉ kontraŭ la patrina amo. Eble neniun ni pli turmentas en la mondo, kiel nian patrinon, al neniun ni estas tiel maldankaj. Homa egoismo! Tiel certaj ni estas, ke neniun, kiel nia patrino, estas al ni pardononta nian maldankecon... Sed en la vivo estas unu justeca horo por ĉiuj... kaj la larmoj, kiujn ni elverŝas pro la ĵusmorto de patrino, per doloro al nenia simila, devas esti, se ilin oni povas vidi el ĉielo, la plej granda, la plej pura ĝojo, kiujn ni, maldankaj filoj, povas doni al la animo de niaj karaj patrinoj.

JOZ. Mi neniam estis maldanka.

EMAN. Ĉar vi neniam estis ĵuna. Ĉar ĉe vi aliĝis la leĝoj de la vivo. Ĝi estis ankaŭ ribeliĝo, laŭ via maniero. Sed vi jen vidas kiel malbone ĝi rezultis al vi. KREDU ĜIN, la Naturo estas tre

saĝa. Ni devas esti infanoj, junuloj, viroj kaj fine maljunuloj; ĉio—ĝustatempe, kun la pasioj, virtoj kaj malvirtoj propraj de la respondeca aĝo. Tiel malbone ŝajnas pripensema kaj saĝa infano, kiel petolema kaj sensaĝa fimaljunulo: kaj tiel neprope estas ĉe infano senproteste kontentigi per hejma *kocido*, kiel ĉe saĝa viro manĝi amuze en hotelo. Oni devas distingi inter la ĉiamdaŭra ĉiua malboneco kaj la malbonecoj propraj de ĉia aĝo, kun ĝi forpasemaj... Mi tion diras, ĉar ĉe mi vi kredis malboneco la junulan facilanimecon. Jes, vi, Mario, kiel ĉiuj, certe aŭdis parolantajn pri mi, miajn gepatrojn, Jozef-Ludovikon, vi certe scias kion pri mi ili pensadis... Mi bone scias ĝin. Mi estis la hejma perfidulo.

MAR. Ne, ne. Via patrino ĉiam vin senkulpigadis kaj ĉiuj ni vin amadis.

Joz. Pli ol li nin. Kio mankis al li apud ni? Senbedaŭre vi nin lasis kaj sen ni vi vivis feliĉa. (*Ili finis tagmanĝi, la servantoj foriras pretiginte la kafon. La dialogo fariĝas pli intima.*)

EMAN. Tial mi revenis al vi, por ke vi min prijuĝu, nun kiam finiĝis mia aventura vivo, en nomo de niaj jam neekzistantaj gepatroj. Vi diros, ĉu mi estis malbona filo, ĉu mi estas malbona frato, kaj por tio, se vin blindigos restĉagrenoj, kiuj ne devas inter ni jam daŭri, Mario prijuĝos. Virinoj pli bone komprenas, kio estas bona ĉe la koro de viro. Ĉe ni, kiel vi estus provincaj koni la mian, se mi neniam povis paroli per la koro!

MAR. Nu, ne varmiĝu. La pasintaĵo, jam pasis. Hodiaŭ ĉiuj ni scias, kiel vi valoras. Ne estus

tiel favorinta vin la ŝanco, se vi ne estus inda je ĝi.

EMAN. (*Sekvante sian ideon kaj sin turnante precipe al Mario*). Vi ja scias, kiel ni vivadis en nia hejmo. Vi estis najbaroj niaj, kaj via patro egala al la nia per karaktero; ial ili estis samnegocanoj. Tie neniu havis alian volon, krom tiu de mia patro. Kia rigideco, kia severeco! Kiam li estis hejme, ni parolis mallaŭte, niaj ludoj lin malplezurigis, niaj ridoj lin doloris. Ni vidadis lin elirantan gaje, ni libere spiradis, ludadis, ridadis. Nia patrino ne estis tia. Ĉio en ŝi boneco, ĉio en ŝi mildeco, nia defendantino ĉiam, nia kunkulpulino multajn fojojn.—Ne malplezurigu vian patron,—ŝi diradis al ni:—li estas tre bona, sed ĉiam priokupata per siaj negocoj. Ĉion por vi, miaj karaj, por vi li tiel multe laboradas kaj klopodegas...—Kara patrino! Ŝi volis konvinki nin pri tio, ke nia patro estas tre bona... kaj nin amas, kaj ŝi nin kisas por ambaŭ... Mia patro neniam min kisis. Laboradi, klopodegi por la negocoj, tio estis la elmontriĝo de lia amo. Sed tiu laborado, neniam komfortigita de niaj karesoj, ŝajnis sen ili pli peniga, malvolonta, malaminda, sendanka... Farso de patra amo! Li klopodegis por siaj negocoj, ĉar ili estis lia sola ĝuado en la vivo: li estus same farinta sen edzino, kaj sen idoj al kiuj heredlasi la frukton de siaj klopodegoj. Tio estis la pasio de la avida negocisto. Pli peniga la laboro estas por la kompatinda laboristo, pli peza ŝarĝo estas por li liaj idoj, kaj fininte la ĉiutagan laboron, li ankoraŭ trovas fortojn por preni ilin en siajn brakojn kaj amemocion

en sia koro por ilin kisi. (*Al Jozef-Ludoviko*). Vi ne rimarkis la mankon de dorlotoj kaj karesoj. Vi estis tre lerta pri kalkuloj, kaj sciis kion nia patro gajnadis... Mi ribeladis kontraŭ lia nejusta severeco, en mia koro protestadis... kontraŭ tiu amfarso, kaj tial mi estis la malbonulo, la perfidulo, ĉar... eĉ plej multe penante por tio, mi ne povis ami, nek respekti mian patron.

Joz. (*Sin levas. Scvere*). Vi ne respektis lin, vivantan, ankaŭ vi ne respektas lian memoron. Ni neniam konsentis estimante lin. Ĉar miaj sentoj estas pli respektindaj, kiel pli naturaj kaj indaj je filo, respektu ilin.

MAR. (*Ankaŭ sin levas. Sin turnante al unu kaj alia dezirante ilin interpacigi*). Jozef-Ludoviko!... Ĉu vi ne estas kolerigitaj? Forlasu rememorojn, forĵetu tiun suspektaman malkonfidon... Mi ja scias ĝin; unu malkonfidas pri la amo de la alia: jen la maniero neniam atingi la reciprokam adon. (*Al Emanuelo*) Vi estas ne justa: Jozef-Ludoviko tiel multe deziradis vin revidi... (*Al Jozef-Ludoviko*). Kaj Emanuelo, kiam vi forestas, parolas al mi pri vi tiel amemel... Kompreneble, vi estas ja fratoj... (*Altirante unu al la alia*). Ĉirkaŭpremu vin tre forte, tre forte... (*Ili sin ĉirkaŭpremas reciproke*). Kaj ĉirkaŭpremon al mi, kiu kunigu nin tri... (*Al Emanuelo*). Ankaŭ mi estas via fratino... kaj vi devas kredi al mia amo... (*Kun infaneca konfido*). Mi estas tre malsekretema... (*Mallaŭte*). Jozef-Ludoviko havas alian karakteron... Sed funde li estas tre bonkora.

EMAN. (*Ankaŭ mallaŭte al Mario, sed ne aparten.*

Fozef-Ludoviko estas sin retirinta funden.)
Funde! Tion oni diris pri mia patro. Kiel grave, ke en la fundo de puto estas trezoro, se por atingi ĝin mi devas droni?

JOZ. (*Al Mario*). Ĉu vi intencas hodiaŭ eliri? Mi sendos al vi la veturilon. Mi iras al la borso.

EMAN. (*Kun komika malsato*). La veturilon?... Ni ne bezonas vian veturilon.

JOZ. Sendube nova frenezaĵo!

EMAN. (*Al Mario*). Mi permesas al mi meti je via dispono la kaleŝon kaj la ĉevalparon, kiuj hieraŭ tiel multe plaĉis al vi.

MAR. Ne, Emanuelo. Tio estas sensencaĵo. Vi elspezis kapitalon por min regali.

EMAN. Ve, miaj karaj filoj! Ili estas falontaj en mizeron!

MAR. Vi povas ankoraŭ ilin havi.

EMAN. (*Serce*). Ne, tute ne. Vi jam sciis ĝin. La filoj estas tre maldankaj. Mi ne volus esti mia filo, kaj se mi estus filo mia, mi ne volus esti mia patro...

MAR. (*Kun rida mieno*). Kiaj malspritaĵoj! Nu, mi ne akceptas la donacon.

EMAN. Mi koleros (*Al Fozef-Ludoviko*). Kun tiu kondiĉo mi repacas kun vi. (*Aneme, metante sian brakon ĉirkaŭ lian kolon*). Malafablulo! Vi ja finos min amante! Unu ĉirkaŭpremon...

MAR. (*Komplezita*). Kara Emanuelo! Oni prave diras: malbona kapo, sed bona koro. Vi ja vidas, ĉu mi juste vin taksas.

EMAN. Ha, Mario! El vi ja fluadas amasoj da boneco; apud vi neniu povas esti malbona. Eĉ nur pro tio, ke li vin elektis kiel edzinon kaj li vin tre amas, mi devus ja ami mian fraton. Jes, sinjoro

frato; ĉion mi pardonas al via Moŝto, sed gardu vin esti malbona edzo... Iru al la borso, al viaj negocoj... Ĉu vi scias kion mi pensas? Dio volu, ke ĝi ne ŝajnu al vi malnoblega! Mi ĝojus, se ĉio al vi malprosperus, se vi perdus ĉion, se vi ruiniĝus... kaj tiam vi vidus, kia mi estas, mi, la fripono, la senkorulo... (*Fozef-Ludoviko lin ĉirkaŭpremas kortuŝite*).

MAR. (*Gaje*). Tiel plaĉas al mi!

EMAN. Mi estas tiel kontenta!... Mi ploras pro gajeco... Se vi sciis, kio estas vivadi sola, sen iu, por kiu niaj ĉagrenoj aŭ niaj ĝojoj povas esti ĉagreno aŭ ĝojoj!... Ne povi senpremigi la koron... Senĉese amasigi sur ĝin malĝojojn kaj ĝojojn kun neniu partigitaj... Ve, nepre ĝi devas malmoliĝi! Nun lasu, ke mi ploru kaj ridu ĉe vi, kiuj min amas kaj kompatas pro tio, kion mi sola ploradis... kaj estas hodiaŭ feliĉaj pro mia gajeco...

MAR. (*Kortuŝita*). Kara Emanuelo! Kiel bona vi estas!

EMAN. Mi estas bona! Ĉu ne vere? Tion vi diras, tion ankaŭ diris mia patrino, la du plej bonaj personoj, kiujn mi konis. Mi devos ĝin kredi!

MAR. Ankaŭ tion diras multaj malriĉuloj, Emanuelo. Ĉion oni ekscias.

EMAN. Ne, ne. Kia merito, ke mi donacas tion, kio al mi malmankas!

MAR. Ankaŭ en Ameriko multaj senhelpuloj benas vian nomon, ĉar vi praktikis la bonfaradon kun amo.

EMAN. Kun amo? Ankaŭ ĝi malmankis al mi; vi ne min konvinkas. Vi nun vidus, kiel mi ŝparas la amon kaj la monon. Kaj se fine... kia diablo! Mi ĉi tien venis por unu Emanĉjo. Vi jam povas ĝin konduki al mi.

- MAR. (*Malice*). Ni por tio sendos petoskribon.
 EMAN. Ja, ja, multajn petoskribojn.
 JOZ. (*Adiaŭdirante*). Do, mi sendos al vi la veturilon?
 EMAN. Ne, frato; nenion pli pri tio.
 MAR. Mi unuafoje uzos vian donacon. Sed vi min akompanos.
 EMAN. (*Al Jozef-Ludoviko*). Ni iros por vi... Ĝis revido.
 JOZ. Ĝis revido. (*Fli sin ĉirkaŭpremas*).

SCENO VI

MARIO kaj EMANUELO. *Fine LUDOVIKINO*

- MAR. Ĉu vi vidas, ke li estas tre bona?
 EMAN. Malafabletulo, malafabletulo! Kion, do, mi dirus al vi? Vi ja tro lin konas!
 MAR. Tre sinkaŝema karaktero, koro ne malfermiĝanta al la unua alveninto. Tre penige estas malbari ĝian enirejon!
 EMAN. Estas personoj tiaj, kiel iaj loĝejoj; kun belega ĉambraro kaj malbona ŝtuparo.
 MAR. Malmulte mi taŭgos, se mi ne sukcesos, ke vi amu unu la alian per vera frata amo!
 EMAN. Mi venas avida pri amo! Tiel longe mi vivadis sola!... Fremda ĉie! Mia protektinto, mia vera patro, Don Gabriel, mortis iom post kiam, li min forprenis kun si. De tiam mi ne havis amikon, mi neniun havis. Nek nedaŭraj aventuroj, iluzioj de la amo, por trompi mian malgajegan solecon. Estas praktikaj animoj, kiuj scias tia-

maniere disdoni la koron por malprofundaj aminklinoj, ne donante ĝin tutan al iu, ke el mil amoj mildaj, trankvilaj, kunfaras plaĉan varmeton, kiu komfortigas kaj malpremas la koron... Mi ĉiam estis kuraĝega en miaj entreprenoj, ĉiam en ili mi kompromitis mian tutan kapitalon; en unu sama tago, la ruinon aŭ la riĉegecon. Tial mi timis ami, ĉar en unu solan amon mi estus demetinta mian plenan koron, mian tutan animon... kaj eble ĝi estus kaŭzinta mian ruinon! Mi estis tre feliĉa en miaj entreprenoj. Eble la sorto estus sin venĝinta! Pretendi por ĉio feliĉon estis ĝin vetbatali.

MAR. Tial same ke vi ne malboneluzis vian koron, vi trovos por ĝi indan okupadon. Mi ĉiam kredis, Emanuelo, ke vi estas bona; vi meritas esti feliĉa.

EMAN. (*Sidanta sur seĝego aŭ chaise longue, ekdormiĝanta*). Ni atentos la okazojn. Mi estas lacega kaj ne volus rekomenci vaganta la migradon.

MAR. Ne, Emanuelo, ripozu. Ripozu kaj pensadu en la konstruo de via hejmo.

EMAN. Jes, Mario. Dume, lasu en la via lokon al tiu ĉi transfluga birdo.

MAR. (*Ameme*). Ĉu vi deziras dormi? Vi kuŝiĝis tiel malfrue!...

EMAN. Estas tia mallaŭtego, tia trankvileco en tiu ĉi domo!...

MAR. Dormu... (*Paŭzo*).

EMAN. (*Mallaŭte, duondormanta*). Mario!...

MAR. (*Ameme alproksimiĝante*). Kion? Emanuelo...

EMAN. Nomu min frato.

MAR. Frato!

EMAN. Tiel .. Estis mia iluzio havi fratinnon...

MAR. Vi ĵam ŝin havas.

EMAN. (*Fom post iom dormiganta*). Jes... Kiel bona... kiel bela! Vi... kaj mia patrino... (*Restas dormiganta*).

MAR. (*Rigardante lin atente*). Kara Emanuelo!... Li estas infano!

LUDOV. (*En la pordo*). Mastrino...

MAR. (*Altrudante silenton*). Cist!... Mi iras. Ne bruu. (*Montrante Emanuelon*). Sinjoro Emanuelo dormas. (*Eliras*).

FINO DE LA UNUA AKTO



AKTO DUA

Eleganta kabineto

SCENO UNUA

JOZEF-LUDOVIKO kaj EMANUELO, *sidantaj*

EMAN. Mi ne kredis, ke vi revenus tiel frue. Tiuj aferoj estas tiel komplikkonfuzaj.

Joz. Dank' al mia interveno ĉio povis ĝustatempe aranĝiĝi. Mi faris bone ne ĝin prokrastante. La monkvanto estis sensignifa kaj la afero estis pri unu el miaj korespondantoj plej estiminda pro lia honesteco kaj aktiveco. Neniel mi povis toleri, ke li estu bankrotinta. Sed ĉiutage la negocoj min plilacigas, mi taŭgas por nenio... tiu ĉi vojaĝo, tiu ĉi afero kaŭzis al mi tian ĝenecon, tian ekscitiĝon...

EMAN. Mario restis kun ĉagreno, ĉar ŝi lasis vin forveturi. Ŝi timis, ke la vojaĝo estus al vi malutilonta. Kion vi ne devis fari, tio estis foriri sola; ĉar mi konas vian karakteron kaj vi energie malkonsentis, mi ne insistis por vin akompani; sed mi devis tion fari.

Joz. Vi estis ĵus veninta post vojaĝo longa, peniga

kaj ĉu vi devus vin ĝeni?... Kaj plie, Mario restus sola... kun sia malgaja karaktero...

EMAN. Kiel bona estas Mario! Ĉu ne vere? Bone mi havis okazon taksi kion ŝi valoras! (*Paŭzo*). Mi alvenis Hispanujon, jam kun ĉagreno esti farinta la returnan vojaĝon. Estis al mi malgaje senti min ĉie malgaja. Sed reveni mian patrujon kaj ankaŭ min trovi fremda en ĝi!... Kiu memoris ankoraŭ pri mi? Kiu min atendus? Vi, jam edzigita... ni ambaŭ disiĝis preskaŭ infanoj kaj nia patra amo kunportis envolvite ĉiamdaŭrajn ofendetojn kaj konkurojn... Nia patro vin preferis kaj min nia patrino... La batalado estis ĉe ni senĉesa... kaj vi ĉiam venkadis! Ni disiĝis sen malgajeco, ni apenaŭ komunikis unu la alian; unu letero iam post iam. Vi ja vidas, kion mi povis de vi esperi revenante! Mia unua intenco estis iri en hotelon. Kaj atentu, kia mi estas! Kiam mi estis tuj dironta la adreson de iu hotelo al la servisto, kiu portis en veturilon miajn valizojn, ŝajnis al mi, ke la tero malfirmiĝas sub miaj piedoj... kaj kun larmoj en okuloj, dum ekpuŝego de mia koro, mi diris la adreson de via hejmo... Ĝi estas la hejmo de mia frato!... Tiel, mi fiere diris. Mia frato!... Mi sentis honton kaj doloron pro tio, ke oni kredis min fremda en mia naskolando. Mi eniris vian hejmon, malkonfide, suspekteme. Viaflanke, vi same min akceptis. Bah! mi pensis: mi plenumos tiun ĉi familian devon, mi restos unu semajnon... kaj ree vagadi, jen estas mia destino. Kaj, vi tion vidas, la malkonfidoj disiĝis, ni konfidas hodiaŭ al nia amo kaj mi ne pensas foriri... Mi ne volas ĝin pensi. Mi, kiu

vivas feliĉa en la nesia hejmo. Nu, ĉio estas nur efiko de Mario, sen ŝi ni estus pli incitintaj nian venĝemon. Dio scias, ke ni estus por ĉiam malpacintaj! Mi konas mian karakteron, mi konas la vian.. Mario faris, ke ni estu, fine, fratoj. (*Ĉirkaŭprenas lin*).

Joz. Ŝi tre simpatiis kun vi!

EMAN. Ŝi amuziĝas aŭdante la rakontojn pri miaj vojaĝoj.

Joz. La vojaĝoj entuziasmigas ŝin. Antaŭlonge mi promesis al ŝi konduki ŝin en Parizon, Londonon, Italujon... vojaĝon tra Eŭropo. Sed miaj aferoj kaj mia farto ne permesis, ke mi al ŝi plenumu la promeson.

EMAN. Nu, vi ja devus fari tian vojaĝon. Veturadi kun kara estaĵo kredeble estas tre rave! Por persono sola, ĉio surhavas ian melankolion en fremda lando.. Ju pli estas grandioza la pejzaĝo, ju pli mirinda la arta verko, des pli ĝi nin premeigas per sia grandiozeco!... Solaj antaŭ tia belgrandeco, pigmeoj kontraŭ la grandiozeco!... Sed du amantaj gekoroj, duone ĝuante la admiradon, en dolĉa amgustumado, kiel framdaĵo samtempe mordita de du amantaj gebuŝoj, pli pro la ŝato al ŝmaco, ol al frandaĵo!... Ne, ne estas grandiozaĵo, nek superbelaĵo kapablaj ilin premeigi. La malavarbela panoramo de la Naturo, la superravaj malfuŝaĵoj de la Arto... fono akcesora, ornama por ili de io alia pli granda, pli superbela, ol Arto kaj Naturo... La amo, kiu tremetbatas en iliaj elravitaj animoj.

Joz. Bone, frato, bone! tiun komparon vi ne faris parkere. Multe vi estas vojaĝinta sola... Sed, nu, iun vojaĝeton vi faris akompanate, en dolĉa

amgustumado, kiel vi diras. Estas aferoj, kiujn oni ne povas bone esprimi, ne provinte ilin.

EMAN. Provi ilin? Jes!... Sed ĉe ni estas du vivoj, ĉiam paralelaj. Unu, kiun ni vivas, teksaĵo de la hazardo kaj destino, en kiu ni estas ludiloj de cirkonstancoj, de okazoj neantaŭviditaj, neeviteblaj... Alia, kiun ni revas, trakomunikilo de lumo, kiun la imagado malfermas al aliaj mondoj, kie ni estas superaj al la fatalo de nia destino, kie la teksaĵon de nia vivo oni teksas per fadenetoj de ĉiukolorbrila lumo. Kio en tiu ĉi dua vivo nin frapas, pro sia senkorpeco kaj neesprimebleco, ĝi lasas tiel fundan sentaĵon, kiel tio, kio nin frapas en la unua... kaj el ambaŭ, pli bona estas la imagita, ol la travivita.

Joz. Tia poezia idealeco ne sidas malbone ĉe negocisto. Kaj oni diras, ke la nombroj elsekigas imagadon!

EMAN. Tio estas, ĉar la nombroj manuzitaj de mi, estis kiel vastega haveco da rimoj manuzita de poeto. La nombroj havas ankaŭ sian poezion, kiam ili obee alkuras por esti matematika aserto de la povoplena pensado, kiu ilin elnaskis. Ĉu oni pensis mil? mil ja rezultas... ĉu milmilionoj? do, milmilionoj. Ha! la arto gajnekollekti monon havas ankaŭ sian estetikon. Estas bonaj kaj malbonaj negocoj, tion oni scias; ankaŭ estas belaj kaj malbelaj. Ŝajnas, ke estas same diri: Li faris bonan negocon, aŭ li faris belan negocon. Tamen, ne estas same. Kiam oni diras pri negoco, ke ĝi estas bona, ŝajnas, ke oni nur celas la rezultaton, ne la procedon. Sprita aŭ nedelikata en sia plano, finita inter tordiroj, faloj kaj falspaŝoj, se la gajnon fine

oni atingas, ĝi estis bona, la negoco! Kiel diferece, kiam bone planliniita pri ĉiuj ĝiaj eroj, kombinita per sprita lerteco, eĉ unu detalo ne deflankiĝas de tio antaŭvidita, ĉio trafas sian celon, kvazaŭ altirita de mirinda sorĉo!... Tiel devas esti la belaj negocoj, tiel la miaj estis ĉiam. Mi estis la Byron' o de la Aritmetiko; en ĉiama orgio de milionoj mi elpensis poemojn miregigajn.

JOZ. Certe, miregigaj. Kiuj al vi permesos, fine, kunigi tiujn du vivojn, kiujn vi nomas paralelaj, en belan kaj realan poemon de amo kaj feliĉo.

EMAN. Jam estas malfrue por mi!

JOZ. Ĉu vi kredas, ke estos malfacile al vi trovi tian virinon, kiel Mario?

EMAN. (*Sin levante*). La feliĉuloj certigas, ke tre facile estas feliĉiĝi! Kiel facile repreni brilanton el sur la strato, kiam la piedo ĝin puŝektuas! Sensenca frenezulo tiu, kiu elirus ĉiutage el sia domo kun obstino renkontiĝi kun unu! Mi estas humila, Jozef-Ludoviko; ĉar mi multe batalis kontraŭ la sorto, mi scias ke la sorto estas supera al ni. Neniu fieriĝu pri sia feliĉo. Vanta kaj tromemfida estas kiu kredas ĝin meriti!

JOZ. (*Malkonfide*). Laŭ tio... mi ne meritas la mian?

EMAN. Atinginte ĝin, oni povas sin montri inda je ĝi.

JOZ. (*Alproksimiĝante al Emanuelo, mallante*). Ĉu Mario havas ian plendon pri mi?

EMAN. Kia ideo!

JOZ. Ĝi trafis mian pensadon, mi ne povis ne ĝin eldiri. Ĉar, kiel vi diras, mi ne kredas meriti la feliĉon havi edzine Marion, mi malkonfidis pri mi...

EMAN. Sed vi devas al ŝi konfidi.

Joz. Nu, kelkajn fojojn, mi pensas, ke Mario ne estas feliĉa kun mi. Dio ja scias, ke mi tutkore ŝin amas! Sed, mi ne scias ĝin esprimi! Figuru al vi dolĉeravan melodion en la menso de superega artisto kaj kiel rimedojn ĝin esprimadi la fingrojn mallertajn kaj tremajn, kiuj frapas sur malagorda fortepiano... kelkafoje mia tuta animo, ravita, iras al ŝi en ekstaza adorado... sed nur mia animo... Ŝi neniam min vidis surgenuan kaj mi ĉiam estas ŝin adoranta! Ne, Mario ne scias kiom mi ŝin amas. Vi havas alian karakteron; mi estas certe, ke vi ambaŭ parolis pri mi. Kion ŝi diris al vi? Emanuelo, ĉu ŝi estas feliĉa kun mi? Se ŝi ne estas, mi promesas min korekti, ĝi ne povas esti pro malbonkoreco, mi ne estas malbonkora, ĝi eble estas pro difektoj, kiujn mi ne konas, pro iaj difektoj, kiujn mi trovas ĉe mi kaj penas venki... pro tiaj aferoj, pro bagateloj, kiujn mi povas eviti... Diru al mi ĉion. Kion mi ne farus por vidi ŝin feliĉan?

EMAN. Kial ŝi ne estus? Difektoj! Kiu ne ilin havas? Ŝi diris al mi nenion. Ŝia plej granda malĝojo, tio estas vin vidi malsaneman; jen la sola afero, kiun mi scias... ke vi ambaŭ ne multe ĝuadas je la vivo pro via farto; ke vi ne iras al amusaĵoj; ke vi ne multe vin rilatas kun la mondomo... Tio ne povas esti motivo por malfeliĉo en edzeco, kiam la edzino, kiel Mario, rezignacias vivadi ĉiamhejme.

Joz. (*Pensema*). Jes, nia vivo ne estas tre gaja.

EMAN. Penu vin animi. Lasu la negocojn, per ili la vivo eluziĝas tre rapide. Ne komencu esti maljuna, kiam Mario ankoraŭ estos juna.

Joz. Vi estas prava. Mi ŝanĝos mian vivadon. Mi

bedaŭras, ke mi jam entreprenis tiun ĉi novan negocon, kiu min tenos senlibere la tutan jaron. Ni kunvojaĝos, oftiros al amikoj, al teatroj... (*Sanceliĝas kvazaŭ atakita de kapturniĝo kaj apogas sin al Emanuelo*).

EMAN. (*Alarma*). Kio estas al vi?

JOZ. Nenio, eksveno... nenio, ĝi jam pasis (*Furioze*). Ĉu vi ĝin vidas? Sana mi estas! Malbeninda farto! Estas pli bone morti.

EMAN. Ĉu vi volas ion?... Ĉu ĝi jam pasis?

JOZ. Jes, ĝi estas nenio. (*Aŭdante ke Mario alvenas*). Mario; ne diru al ŝi eĉ unu vorton, ŝi ne alarmiĝu... Mi jam bonfartas (*Animiĝante*). Tre bone... Donu al mi cigaredon... (*Sin levas kaj promenas ŝajniĝante animitecon*).

SCENO II

LA SAMAJ kaj MARIO

MAR. (*Al Emanuelo*). Diru, kion vi volas. La konsento finiĝis ĉe ni. Mi venas vin malpacigi. (*Al Fozet-Ludoviko*). Vi devas riproĉi Emanuelon, sed tre serioze.

EMAN. Bah!

JOZ. Kio estis?... Mi jam supozas, ian novan donacon... (*Al Emanuelo*). Mario estas prava.

EMAN. Mi tuj foriras...

MAR. Haltu!... (*Montrante juvelujon*). Rigardu... (*Al Fozet-Ludoviko*). Mi ne povas promeni kun li, mi ne povas fikserigardi en montran fenestron... Diru, ke li tion redonu, aŭ ni malpacos; ĝi estas malŝparego.

EMAN. Ĝi ja ne penindas paroli. Pinglo, ĉirkaŭmano... Mi ŝatas, ke vi ilin portu hodiaŭ dum la Reĝ-teatra prezentado... Ho ve, mi senvole diris, mi malkovris la konspiraĵon... Mi ĉion diros. Mario sentis ŝatdeziron alesti al la hodiaŭvespera prezentado; ĝi estas nova opero, ekster-abona teatraĵo; mi sukcesis aĉeti loĝion... Mi invitis vian amikinon Emiliinon kaj ŝian edzon; ili traktas min tiel afable...

MAR. Ĉu vi vidas?... Nepre ni malpacas. Mi diris, ke mi ne iros. Mi ne iros. Jozef-Ludoviko venis hodiaŭ matene el vojaĝo, li certe estas laca, ne ŝatos iri teatron, ĉu ne vere?

Joz. Nu, ne. Mi deziras aŭdi tiun operon. Mi aŭdis paroli pri ĝi .. Ni iros.

MAR. (*Gaje*). Ĉu vere vi volas, ke ni iru?... Kiel mi ĝojas! Mi ne kuraĝis ĝin diri al vi, sed mi tre deziris iri hodiaŭ en la teatron; oni diras, ke estos belege... Nu, Emanuelo, nur por tiu ĉi fojo ni ne malpacas, multajn dankojn... De kiam ni ne iris al la teatro? Kiu ĝin scias!... Ĉu la loĝio estas partera, vere?... Mi ekuzos la broĉon kaj la koljaron... Mi nescias kiun veston surmeti...

Joz. Ĉu vi estas kontenta? (*Kun milda mallaŭdo*). Kial vi ne diras ĝin al mi ĉiam, kiam vi deziras iri al la teatro? Kelkafoje vi senigos vin je tiu plezuro!... Vi ne estas por mi malkaŝema.

MAR. Ne kredu, ke ĝi estas por mi ofero. Hodiaŭ vespere mi iros plezure, ĉar vi sanas, ĉar ni iras ĉiuj tri... Irante al teatro malofte, nur iam post iam, tio ŝajnas al ni eksterordinaraĵo: same kiel dum infaneco oni kondukis nin al magia prezentado en kristnaska aŭ noma fes-

to... Ni festos tiel la alvenon de Emanuelo... Al teatro! Kiel dum infaneco... Sed ni iras nokte kaj al la Reĝa teatro!...

EMAN. Kaj ni ne amuziĝos kiel tiam! Mi eliras kaj tuj revenos. Malsuprenirante mi ordonos, ke la veturilo estu preta por la naŭa. (*Al Mario*). Ĉu vi volas ion? Vi bezonas ian objekton? Florojn? Ventumilon?...

MAR. Florojn? Mi havas plenajn la tualetejajn florva-
zojn... kaj tie ĉi, rigardu. Ĉiumatene li sendigas al mi amason da ili... kaj ventumiloj!... Ne, Emanuelo vi ja estas tre malbone kutiminta. Gardu por tiuj la donacojn, kiuj nur pro ili vin amos. Tie ĉi ni donas la amon senpaga.

EMAN. Kiel, do, oni rekompencas la senpagan amon?

MAR. Per amo.

EMAN. Nu, regalmontroj de ~~amo~~ estas miaj donacoj, kaj se ili iom valoras, tio estas kiel garantiaĵo, ke mi elpagus per koro kaj vivo tiujn, kiujn mi ŝuldas, se la okazo ilin elpagi alvenus. (*Fo-
riras*).

SCENO III

JOZEF-LUDOVIKO kaj MARIO

MAR. Via patrino bone diris! Estas frenezoj de kapo kaj frenezoj de koro. Emanuelo estas korfre-
neza. Bela frenezo kapabla efektivigi ĉion bo-
nan kaj ĉion grandan, se ĝi trovas okazojn por fari! Sed oni ne pretendu enŝlosi tiajn frenezulojn, nek ilin tiri al la prudento kaj mezuro de la vulgaranimoj. Kio estus fariĝinta Emanuelo

apud vi? La entreprenemaj impulsoj de lia spirito estus turniĝintaj en mizerajn batalojn kontraŭ la patra aŭtoritateco, en facilanimajn mal-saĝaĵojn neindajn je lia nobla koro. En taŭga medio por elvolvi sian genion, li atingis riĉakiron, ŝatatecon. Kaj fronte kontraŭ sia konscienco, li sciis sin eduki per sia propra konscienco, kiu estas la plej bona edukanto, kiam la koro estas sana.

Joz. (*Ironie*). De kiam vi fordonis vin al tiaj profundesploroj? Ĉu vi kaj Emanuelo komencis filozofian interdiskuton? Rimarkigu, do, al Emanuelo, ke lia tuta filozofio kaj ĉiuj leĝoj inspiritaj de lia konscienco, videble en konsento kun lia konduto, ne povos lin senkulpigi pri tio, ke li maldolĉigis la vivadon de mia patro, ke li mortigis lin per ĉagrenado.

MAR. (*Malplaĉigita*). Jozef-Ludoviko!

Joz. Ĝi estas la vero. Mi ne pretendas, ĉar li atingis la favoron de Fortuno, kiu scias, ĉu alkonformigante leĝojn de sia konscienco al la rimedoj uzitaj por prosperi! ke la sukceso de la kulpo lin absolvu pri ĝi... Sed nur ŝajnas, ke li vin ensorĉis, vi kredas lin supera estaĵo, vi aŭskultas lin kun mirego. Kaj li, sagaca por koni, kie li naskas admiron, per la arta fajraĵo de paradoksoj, strangaj teorioj, absurdaj ideoj, penas, ke vi lin admiru, ke vi lin komprenu, ke vi lin amu... (*Ekmovo de Mario*). Ke vi lin amu!... kaj li ja plej rapide sciis sin amatigi.

MAR. (*Parte ofendita kaj parte dolorita*). Kaj... ĉu vi ĝin bedaŭras?

Joz. Bedaŭri ĝin, ne... Mi bedaŭras... Kion mi rimarkadas ĉe vi, de kiam li alvenis, tio estas,

ke vi lin defendas, ke vi min kredas nejusta kontraŭ li... Vi jam havos okazon prijuĝi, ĉu mi estis tia, ĉu mia patro ankaŭ estis... Li apenaŭ alvenis... Li havos tempon agi laŭ sia kutimo!

SCENO IV

LA SAMAJ *kaj* JULJANO

JUL. Tiun ĉi leteron kaj tiun ĉi telegramon oni alportis de S-ro. Montero.

JOZ. Donu. (*Prenas la leteron kaj la telegramon*).

JUL. Kaj tiun ĉi bileton por sinjoro Emanuelo...

JOZ. (*Ne rigardante ĝin kaj malfermante jam la leteron*). Portu ĝin en lian ĉambron... aŭ lasu ĝin ĉi tie, li ne malfruos reveni. (*Fuljano lasas la leteron sur la tablo kaj eliras*).

JOZ. (*Legas la leteron kun monstro de malbonhumoro; finante, li ĉifas la paperon. Kolere*). Kia mallertaĵo! Oni povas fidi al neniu!

MAR. (*Irante al Jozef-Ludoviko, ektimante*). Kio okazas?

JOZ. Montero sendas al mi tiun ĉi telegramon, per kiu oni petas de li ordonojn pri afero, kiu devus esti jam solvita.. Mi skribis antaŭ ok tagoj! Estas neeble regajni tiom da perdita tempo!

MAR. Ne malkvietiĝu!

JOZ. (*Sonorigas. Fuljano eniras*). Ne... Mi mem iros... (*Al Fuljano sin pretigante eliri*). Nenion.

MAR. (*Detenante lin*). Ĉu vi tuj eliros?

JOZ. Mi devas vidi Montero'n.

MAR. Je Dio, Jozef-Ludoviko! Ne eliru nun... Ne agi-

tiĝu... Skribu nur du vortojn... (*Al Fuljano, preta foriri*). Atendu...

Joz. (*Konvinkita*). Estos pli bone... Mi estas tre nervekscitita, mi ne respondas je mia kvieteco. Ĉu vi havas skribilaron? (*Serĉante per rigardo*).

MAR. (*Kondukante lin al la tablo, kaj malfermante pupitron*). Jen estas ĉio... Prenu.. Estas tre malfrue por eliri... Antaŭ ol iri al la teatro vi devos engluti ion... Ni manĝis tre frue... (*Preparante paperon, plumon k. c.*) Jen vi havas. (*Sidiĝas kontraŭ li*).

Joz. (*Mallaŭte dum li skribas tre nervekscite*). La teatro... la teatro!... (*Mario prenas la leteron por Emanuelo, kiun Fuljano lasis sur la tablo, kaj pririgardas ĝin atente*).

Joz. (*Al Fuljano, donante al li leteron kaj du paperfoliojn*). Kurante al Sinjoro Montero kaj de tie al la telegrafejo... tiu ĉi telegramo... urĝanta... respondo pagita...

JUL. Bone. (*Eliras*).

Joz. (*Rimarkante pri la letero, kiun Mario havas en la manoj*). Kiu estas tiu letero?

MAR. La letero por Emanuelo. (*Ne delasante ĝin*).

Joz. (*Malmilde*). Ĉu vi estas ĝin malfermonta?

MAR. (*Kun rida mieno*). Kia sensencaĵo! Mi rigardis, ĉu ĝi estas el virino... Ĝi havas la tutan ŝajnon... kvankam li ĵus alvenis, eble ne mankas al li ia amafero...

Joz. (*Severe*). Ĉu tio estas por vi grava?

MAR. Neniel... (*Rimarkante la jam seriozan mienon de Fozef-Ludoviko, ŝi sin levas kaj direktas sin al li, ĉiam kun la letero en la mano*). Kial vi demandas min tiel? Kion vi volas diri al mi?

- JOZ. (*Furioza*). Lasu en paco tiun leteron! Vi ja min nervekscitas!
- MAR. (*Otendita, pli proksime*). Sed Jozef-Ludoviko!...
- JOZ. (*Fortprenas el ŝi la leteron, ĝin ĉifas kaj ĵetas ĝin sur la tablon*). Malfermu ĝin, eksciu pri ĝi!... Ĉu vi estas ĵaluza?...
- MAR. (*Ofendita, unue kun energio, poste kun profunda malĝojo, ekplorante*). Jozef-Ludoviko!... Jozef-Ludoviko! (*Lasas sin fali sur seĝegon*).
- JOZ. Tio mankis al mi! Mi estas ja por ploroj! (*Eli-ras. Paŭzo*).

SCENO V

MARIO kaj EMANUELO

- EMAN. Mario! Kio okazas al vi? Kial vi estas tiel?
- MAR. Nenio!... Ĝi estas nenio...
- EMAN. Kaj Jozef-Ludoviko? (*Sin direktante kvazaŭ por serĉi lin*).
- MAR. (*Lin detenante*). Ne, ne! Lasu lin... lasu min, ĝi ja estas nenio. Jozef-Ludoviko sentis sin malbonfarta, mi ektimis.. mi estas tre nervekscitita... kaj mi ekploris. Kia malsaĝaĵo!
- EMAN. (*Ekrimarkante la ĉifitan leteron kaj ĝin kaptante*). Ĉu letero? Por mi?... Kio ĝi estas?
- MAR. Jozef-Ludoviko ricevis samtempe telegramon kaj malagrablan leteron kaj furioza li ĉifis ĉion... Jen kial ĝi estas tiel... Pardonu.
- EMAN. Sed kio okazas al li? Kiaj estas tiuj sciigoj?
- MAR. Iu afero... ia mallertaĵo de korespondanto... Vi jam konas lian karakteron, en la unua impresio...
- EMAN. Kiel li certe igas suferi vin!

MAR. Nur mi estas tre malsaĝa, mi ne komprenas, ke tio malaperas tuj de li.

EMAN. Kia karaktero!... Antaŭ nelonge li estis kun mi, tie ĉi mem, parolante tiel gaja, tiel komunike-
ma... Ĉu vi rememoras?... Li stimulis nin iri al la teatro... Bah! Tio ĉi ne povas esti... Mi iras lin serĉi.

MAR. Ne, Emanuelo... Li ja venos... Ne iru.

EMAN. Kiu ajn diros, ke vi timas lin... Atentu, ĉu vi scias, kion mi pensas? Ke ni devas lin puni, kiel la kapricobstinajn knabojn... Ni iras al la teatro kaj lasas lin sola. Ĝi estas tre stranga karaktero!

MAR. Ne, mi ne iras al la teatro. Iru vi sola. Ne kalkulu sur nin, mi vin petas... Ne disputu kun Jozef-Ludoviko tiun ĉi vesperon!...

EMAN. Mi ne kredas, ke li estas kolera pri mi...

MAR. Kiam li estas malbonhumora, li estas tia por ĉiuj.

EMAN. Nu, mi diras al vi, ke li estas plej malsukcesiga por la festoj! Kaj ni estis tiel kontentaj pri nia opero!... Ni ja devas iri, vi vidos... Mi iras min vesti... Kaj kreu min, faru la samon... Ne estas la afero malĝoji, ĉar unu negoco neatendite malsukcesis... Ĉio konsistos en kelkaj pesetoj malplie... malplie en gajnado he?... sed ĉiam gajnante... La afero estas plendi.

MAR. Vi vidas tion! Kiu povus esti pli feliĉa, ol ni?

EMAN. Ha mia kara! Se la riĉuloj, do, ne furiozus, nek mortus, la sociala revolucio estus jam fakto. Estas konvene kredigi, ke ni estas malfeliĉuloj, ke la mono ne feliĉigas... kaj atentu, pri tio mi jam de longe estas konvinkita. Mi iras vesti min... mi revenos al vi, kaj se li ne volas veni, des pli bone, ni ne lin bezonas... Ni iros solaj.
(*Eliras*).

SCENO VI

MARIO

Kia diferenco!... Fratoj pli malsamaj!... Jozef-Ludoviko venis al tia ekstremo de strangeco, ke estas neeble lin kompreni. Li turmentas sin mem kaj turmentas nin ĉiujn... Li ne amasian fraton... oni ja vidas... Ĝi estas antipatio, repuŝemo nevenkeblaj. Mi konas, ke li batalas por ilin elŝiri, sed ili estas tre profunde enradikitaj... Ideoj, sentoj... ĉio estas malsama en ili... Kaj Emanuelo lin amas... Emanuelo estas bona. Jozef-Ludoviko estas nejusta kontraŭ li!... Mia koro ribelas kontraŭ lia malbonvolo por lin riproĉi.. Tiu severa malafabla mieno de lia patro!... Ŝajnas ke mi estas ankoraŭ lin vidanta. Kiam ni estis infanoj li timigis nin... nur Jozef-Ludoviko kuraĝis fronti kontraŭ li.. Lia patrino ŝanĝe... Kiel bona por ĉiuj! Ĉiuj ni povis enresti en ŝiaj brakoj, por ĉiuj ŝi havis karesojn!... Tiel kontraŭaj ili ambaŭ estis, ke eĉ donante vivon al siaj idoj ili ne kununuigis. Kompatinda patrino! Kiomfoje mi vidis ŝin, kiu kaŝate ploris!... Kiel mi nun... Mia Dio, kia malĝojo!... (*Kun mallarĝa ploro*). Kia ĉiama ofero estas mia vivo!... Kaj mi neniam plendis! Per tuta la amo, per tuta la abnegacio de mia animo mi penis fari lin feliĉa... kaj li ne estas! (*Maldolĉe*). Kaj se li ne estas!... Kiel mi povas esti?... Ĝi ne estas mia kulpo. Dio mia! Ĝi ne estas... Patrino mia! (*Restas plorante*).

SCENO VII

MARIO kaj EMILIINO

EMIL. (*Interne*). Lasu, lasu,... kie ili estas!...MAR. (*Aŭdante la voĉon de Emiliino sin levas kaj penas sereniĝi*). Ha, Emiliino...EMIL. Jen mi estas. Via bofrato estas tiel aminda, ke li invitis nin al la teatro hodiaŭ vespere. Sed Ferdinando ne povas akompani min dum la unua horo, mi ne volis eniri malfrue kaj venas por iri kun vi... se mi ne ĝenas. Mi venis en mia veturilo. Ni povas iri en ĝi kaj Jozef-Ludoviko kaj Emanuelo en la via... Kiel varme estas ĉi tie! (*Formetante sian surveston*). Mi vestis min tiel rapide!... Mi timis ne trovi vin... kaj vi ankoraŭ estas tiel... Ĝi jam estas preskaŭ la duono de la naŭa... Mi ja scias, ke Jozef-Ludoviko bone alvenis... Kio okazas al vi? Vi havas malsanan vizaĝon... Sed, nu, mia kara, vestu vin por la teatro... Mi estas tre maldelikata, ne plaĉas al mi eniri kiam la prezentado estas komencita.

SCENO VIII

LA SAMAJ kaj EMANUELO kun frako kaj floro en la butontruo

EMAN. Pri mi, kiam vi volos... (*Ekvidante Emiliinon*). Ha, sinjorino!...EMIL. (*Salutante lin*) Mi tre dankas vian amindecon.

EMAN. Kaj via edzo?

EMIL. Li iros pli malfrue. Li havas konsiliĝon en la klubo...

EMAN. (*Al Mario*). Kaj Jozef-Ludoviko?...

MAR. (*Flanken al Emanuelo*). Je Dio, Emanuelo! Vidu, kia situacio... Kiel diri al Emiliino!... kaj mi ne povas iri.

EMAN. Kiel! Iru vin vesti. Mi parolos al Jozef-Ludoviko.

MAR. Ne, ne... Tiun ĉi vesperon mi timas lin!

EMAN. Mario!... Tio okazas? Vi timas!... Vi estos alia kompatinda oferito kiel mia patrino. Vi, tiel bona, tiel sankta, kiel ŝi! Ho, ĝi ne povas esti; mi diras al vi, ke Jozef-Ludoviko min aŭdos.

MAR. Ne, Emanuelo, mi vin petas.. Vi ne konas lin... Li ne kredu, ke mi ja estas, kiu incitas vin kontraŭ li... Dio scias, kion li pensus! (*Ili daŭrigas parolante mallaŭte*).

EMIL. (*Observante*). (Kio estas ĉi tie?... Io stranga okazas... Ĉu Franciskino estus hieraŭ prava?... Mi ne kredas ĝin... Sed, estus vidinde!...) (*Rigardas la horloĝon. Laŭte*). Tri kvaronoj de la naŭa... Ĉu eble mi venis ĝeni? Ĉu vi ne intencis iri al la teatro?

EMAN. Jes, jes... Nu, Mario, vestu vin... Vi ja vidas... Kiel lasi Emiliinon?... Mi iras por Jozef-Ludoviko... Mi diras, ke li iros... Jen li venas ĝustatempe.

SCENO IX

LA SAMAJ *kaj* JOZEF-LUDOVIKO

EMIL. Estu bonveninta.

JOZ. Bonan vesperon, Emiliino (*Sidiĝas*).

EMAN. Vi ankaŭ nevestita .. nu... kial vi malfruas?...

JOZ. Mi ne iras al la teatro... mi estas malsana... Es-

tas tre malvarme. . mi ne sentas min en humoro por teatro...

MAR. (*Sidiĝante je lia flanko*). Mi, do, restos... Iru, Emanuelo.

EMIL. (Bela afero! Ĉu ili min lasos iri sola, kun ia bofrato?... Riĉa fraŭlo!... Bonaj estas la kondutkritikoj en Madrido!) Se vi estas malsana, ni restos... (*Sidiĝas*).

MAR. (*Kiu jam ne rememoris pri Emiliino, rimarkante sian ĉeeston*). Estas vero, vi... (Kion pensos Emiliino? Mi estas korprenmita!)

EMAN. Estas bone... Ni restos! (*Sidiĝas rezignacie*). Ni restos por maldormi pro la tujmortonto...

JOZ. (*Kolerigita*). Ne... Mi kuŝiĝos... Vi povas iri. (*Al Mario*). Vi ankaŭ.

MAR. Ne, mi ne.

JOZ. Mi diras, ke vi iru!

EMIL. (*Pacigeme*). Ni iru! (*Al Jozef-Ludoviko*). Kaj vi ankaŭ... Animiĝu... Hodiaŭ vi estas kun mieno pli bonfarta, ol neniam... Vi distriĝos; Ferdinando volas paroli al vi... Nu, vestu vin! Vi ne estas ia maljunkriprulo por kuŝiĝi je la oka! Per Dio! Se vi kutimiĝas al hejmosidado... en via aĝo... Lenu per via frato... Tiel, belsintena kiel knabo...

EMAN. (*Al Jozef-Ludoviko, flanken*). Nu, Jozef-Ludoviko! .. Vi ja vidas, ke Emiliino ne povas ĉi tie resti... Ne donu kaŭzon por malbondirado. Venu kun ni...

JOZ. (*Malmilde*). Ĉu mi malpermesas al vi iri?

EMAN. Sed Mario ne iras volonte, se vi ne venas.

JOZ. Por kio vi min bezonas?

EMAN. (*Malplezure*). Vi estas neelportebla!... Mi ne scias, kiel Mario havas paciencon...

- Joz. Ŝi ĉiam havis ĝin!... Eŝepte hodiaŭ, kiam vi ĉiuj estas tre malpaciencaj...
- EMAN. (*Perdante la paciencon*). Nu, Mario... vestu vin!
- Joz. Jes; vestu vin... Ne igu min aperi, kiel ridinda edzo!... Vi iru, mi rediras! Mi restas. (*Mario eliras*).

SCENO X

EMILIANO, JOZEF-LUDOVIKO kaj EMANUELO

- EMIL. (*Flanken al Emanuelo*). Diru, diru. Ĉu ĉi tio okazas al li tre ofte?
- EMAN. (*Flanken*). Nun, la komentarioj de la amikineto kun plej bona intenco!... Kiel trafe Jozef-Ludoviko altiras sur nin embarasiĝon.
- EMIL. (*Al Jozef-Ludoviko*). Mia amiko... vi ne sekvas bonan sistemon.
- Joz. (*Flanken*) Tiu ĉi virino finos min incitegi.
- EMIL. Mario iras malvolonte sen vi... Kiaj edzoj! Jen estas du virinoj, ĉiu kun sia edzo, kaj la vesperon, kiam okaze ili deziras iri al la teatro, ili devas serĉi iun por esti akompanitaj. (*Al Emanuelo*). Dank' al tio, ke vi estas fraŭlo...
- EMAN. Sinjorino...
- EMIL. Se vi estus nefraŭlo, oni ne povus kalkuli je vi; vi estus malĝentila kaj malafabla kiel ĉiuj. Sed, je Dio! En kio ĝi konsistas? Unu tagon antaŭ la edziĝo oni ilin kondukas al la modistino, al la vendejoj, al la teatro, kien ajn oni volas, kiel ŝafetojn... kaj post edziĝo... neniu ja povas irigi ilin ien. Ne edziĝu.
- EMAN. Vi ja donas tian ekzemplon!...

EMIL. Kaj vi ne bezonas edziĝi. Se vi estus sola!... Sed vi trovis ĉi tie vian anguleton. Se mi estus, kiel vi! Kun ĉiuj profitoj kaj neniu kontraŭaĵo de la edzeco... La ordo, la familio... Mi ja scias, ke vi faras tre ordaranĝitan vivon, ke vi ne eliras nokte...

EMAN. En tiuj ĉi tagoj, kiam Jozef-Ludoviko forestis, por ne lasi Marion sola... ni tie ĉi pasigis la postnoktomanĝon. Mi rakontis miajn vojaĝojn, aŭ ni ludis je bezigo, aŭ ni legis, unu kontraŭ la alia, romanojn de Loti. Mario ne konis ilin, mi donis ilin al ŝi, kaj ŝi raviĝis...

EMIL. (*Al Jozef-Ludoviko*). Ĉu vi ĝin vidas? Mi vetas, ke al nenia edzo venas la penso aĉeti al sia edzino romanojn de Loti! Nek de ia ajn aŭtoro!

Joz. (*Flanken*). Tiu ĉi virino malesperigas min... Ĉu ŝi intence parolas... aŭ ŝi parolas sencele, ne sciante kion ŝi diras, kaj nur mi estas kiu kredas intencaj ĉiujn ŝiajn vortojn?...

EMIL. Ĉu vi estis hieraŭ posttagmeze kun Mario en la promenejo de veturiloj?

Joz. Ne, mi ja alvenis hodiaŭ...

EMIL. Tial mi ne kredis! Unu el miaj amikinoj, Franciskino Kontreras, disputis pri tio, ke vi alvenis hieraŭ, ke ŝi vidis en promenejo Marion kun ŝia edzo... kaj mi diris, ke ne, ke ĝi ne estus ŝia edzo, sed ŝia bofrato, kaj ŝi ree jesis...

EMAN. (*Kolerege*). Kaj vi neis... Nu, vi estis prava... Tio estis Mario kaj mi... Vi jam scias ĝin... (*Flanken*). Kia virino! Jozef-Ludoviko estas palega. Multe li faros, se li ne ellasos al ŝi ian subitan nepensitaĵon.

SCENO XI

LA SAMAJ *kaj* MARIO *vestita por la teatro*

EMIL. Kiel bela! Kiel eleganta! Belega vesto!... La donacoj de via frato. Tia vi plaĉas al mi... Mirinda ĉirkaŭkolo! (*Prenante ŝin je unu mano kaj prezentante ŝin al Jozef-Ludoviko*). Rigardu. Kiom da viroj envios vin tiun ĉi vesperon... kaj vi tie ĉi, tiel trankvile!

JOZ. (*Sarkasme*). Tiel trankvile!

MAR. (Lia mieno min timigas. Mi komprenas, kio okazas ĉe li). Ĉu vi bone fartas? Ĉu ne malplaĉas al vi, ke mi vin lasas?

JOZ. Ne... Kial?—Amuzu vin multe.

MAR. (*Malĝoje*). Multe! Jes! Vi ja scias, kiel mi amuziĝas vidante vin tiel!

EMAN. (*Flanken, metante sian surtuton*). Kompatinda Mario! Ŝi estas kvazaŭ tuj ploronta. (*Laiŭte*). Ni revenos frue. Ni eliros, antaŭ ol la prezentado finiĝos... (*Proponante sian brakon al Emiliino*). Emiliino... (*Al Jozef-Ludoviko*). Ĝis poste...

EMIL. (*Al Jozef-Ludoviko*). Via farto pliboniĝu... (*Al Emanuelo, akceptante lian brakon*). Vi ne ŝajnas fratoj!

MAR. Jozef-Ludoviko, diru al mi, kial vi estas tiel... Se ne mi restos... (*Decide*). Mi restas!

JOZ. (*Seke*) Rimarku, ke Emiliino atendas!

MAR. (*Malĝoja*). Kiel malbone vi traktas min!

JOZ. (*Kaptante kolere ŝian manon*). Mi? Ĉu mi traktas vin malbone?...

MAR. (*Timigita*). Ve! (*Aŭdinte la krion Emanuelo*

kaj Emiliino revenas el la pordo; Emanuelo alproksimiĝas al Jozef-Ludoviko).

EMAN. (*Aŭtoritate*). Sed, Jozef-Ludoviko.. Jozef-Ludoviko!

EMIL. Ĉu vi fartas pli malbone?

JOZ. (*Al Mario*). Iru, iru... Mi ja diras, ke mi estas sana, ke mi ne vin bezonas...

EMIL. (*Elirante. Flanken*). Ve, ve! Ŝajnas al mi, ke Franciskino estis prava! (*Ĉiuj eliras escepte Jozef-Ludoviko*).

SCENO XII

JOZEF-LUDOVIKO *kaj poste* JULJANO

JOZ. Kiel malbone vi min traktas! Kiel malbone vi min traktas! Neniam mi pensis aŭdi ĉi tion!... Kaj lasi min tiel!... Kvieton, kvieton! Mi bezonas ordigi tiun ĉi tumulton de miaj pensoj... ili sin forpuŝas, unuj mallumiĝas en aliajn kaj mi volas ilin senti unu je unu, klaregajn, palpeblajn. Kio okazas ĉe mi?... Mi volas ĝin vidi!... Jes, mi vidas ĝin!... Mia patrino! Jes, jes, ŝi estas!... Ŝi estis bona, ŝi estis honesta, kiel Mario, ŝi neniam ribelis kontraŭ la severa aŭtoritateco de mia patro, vivis feliĉa en la plej senmakula virto... Sed unu tagon alvenis la vojaĝanto, la amiko al kiu oni malfermas la pordon, kiel al frato.. li alvenis ridema, loganta per la imagado kaj per la sentoj... kaj vivado de honesteco, de virtoj, ne povis malcedi al la altira ĉarmo de tiu viro. Mi estis tre infana, kaj mi rememoras, rememoras... kaj la rememoro fortiki-

gas en mi la malamon, kiun mi sentis al la uzurpulo... Ne, li ne estas mia frato! Li estas kiel tiu uzurpulo, kiu venas min rabi... Ha, ne!... Mi frenezigas! Mario estas honesta!... Ŝi estos ĉiam!... Sed, kial ŝi foriris? Ŝi foriris kun li... Ne, ne elglitiĝu penso, mi volas aŭdi kion vi diras, vidi kion vi imagas!... Ke Mario ne min amas! Ĉu tio estas? Ke ŝi ne povas min ami... Jen la vero de tio, kion mi pensas... Terura vero!... Ŝia amo ne estas amo. Estis pli da respekto, ol da amo en ŝia inklino al mi. Severe edukita de sia patro, ŝi translokis al sia edzo la filan respekton, submetiĝe, rezignacie. Konfidante al mia aŭtoritateco, mi kredis iom post iom formadi por mi ŝian spiriton, samtempe kiam la naturo formadis la virinon... Mia mi povis nomi la korpan belecon, sed la ribela spirito neniam estis mia! Ĝia celo trovis formon kaj al ĝi iras la spirito, kaj post si trenos la tutan vivon... Korpon kaj animon!... Se tio jam ne okazis en mia foresto!... Emiliino parolis intence... Tie ĉi ĉiuvespere, ĉiam kune... Ve, la sola logo de mia vivo! Nun ĉio nigreco kaj malĝojo! Kial travivi vivon tiel mizeran? (*Rigardas sin en la spegulo*). Maljuniĝanta, malsana... Kiel ŝi povas min ami?... Ŝi, juna kaj bela!... Kiel bela ŝi estis!... Kaj mi ŝin lasis kun li... turmentinte ŝin per mia perforto, kiam eble ŝi sentis al mi malamon... malamon kaj malŝanton!... Kaj li, je ŝia flanko, belsintena, deloganta... Ho, ĝi ne povas esti! Mario estas honesta! Mi ne povas esti tiel malfeliĉa!... Kulpa nur estas la malestiminda, jes, la malestiminda rabisto, kiel tiu... kiel lia patro!... Mi ne povas

plu!... Mi sufokiĝas! Juljano. (*Sonorigas. Fuljano eniras*).

JUL. Kion ordonas la mastro?

Joz. Portu al mi la surtuton, la ĉapelon... rapide... (*Fuljano eliras*). (*La deka batas*). La deka! La deka... Kiel frue ankoraŭ!... Mi iros al la teatro, estas tempo... Mi estas febra... Mi iros tiel, kiel mi estas... Mi iros... Iru por veturilo... Ne... atendu... Mi piediros. (*Fuljano eniras*). Estas utile al mi piediradi... Vidi min ŝajnos al ili strange... ili ne min atendas... Kion diri?... Bah! Mi diros... diros... Mi pensos ĝin sur la vojo, tio ĉi min distros... Mi anoncigos min, kiel por vizito, mi ŝercos kun ili... Mi deziras paroladi, multe paroladi... tiun ĉi vesperon mi ne lasas Emanuelon paroli... Mi amuzos ilin, mi igos ilin ridi... ridi, jes... ridi! Kia traspensio! Ho ne! Mi ne faros ridiga teatraĵo por la aliaj tion, kio estas en mia koro terura tragedio... Mi atendas... Sed tiun ĉi nokton... tiun ĉi eternan nokton mi ne povas... Mi sufokiĝas! Mi bezonas piediradi, iradi multe, ĝis tio: fali plenlaca, disrompi miajn nervojn, se ne tiu ĉi nokto estus por ĉiuj pereiga... Mi estas freneza, mi ne respondas pri mi... La surtuton... (*Palpante ĝin interne*). Kio ĝi estas? Armilo!

JUL. La poŝa resolvero de via moŝto.

Joz. Ho! ne, ne... Formetu ĝin, formetu... Gardu ĝin. (*Eliras*).

JUL. (*Kun miro*) Sed, kio okazas tiun ĉi vesperon al mia mastro?

FINO DE LA DUA AKTO



AKTO TRIA

La sama dekoracio de la antaŭa akto

SCENO UNUA

EMANUELO *legante kaj poste* MARIO

MAR. (*Enirante*). Cu vi estas sola? Kaj Jozef-Ludoviko?

EMAN. Li eliris.

MAR. Alian fojon?... Estas strange! Li, kiu antaŭe nur eliris en necesega okazo, jam de kelkaj tagoj ne ĉesas eniri kaj eliri... Mi estas kun timo... Jozef-Ludoviko ne bonfartas.

EMAN. Ne, li ne bonfartas.

MAR. Belan tempodaŭron vi estas pasiganta!... Se vi deziris trankvilecon!

EMAN. Ne, tio ne. Se vi, do, sciis ke mi bezonas absorbiĝi en mi mem por ekkompreni ke mi estas la sama... la malkvieta kaj vagema Emanuelo por kiu senagiteco kaj ripozo estis sinonimoj de enkarceriĝo aŭ de morto... Mi komplezita kun tiu ĉi vivo, kiun, por tiel diri, oni donas al mi faritan, kaj sen priokupado pri alia afero, ol daŭrigi vivante?... Mi, kiu ĉiutage devis pensi

kaj okupi min... pri ĉio el kio konsistas la ĉiutaga ekzistado, pri ĉio ĉu granda, ĉu malgranda... Planfari negocon kaj ordoni la tagmanĝon, la borsajn likvidaĵojn kaj la kalkulon de la lavistino... Mi povis fidi al neniu. Maturaĝa fraŭlo estas kiel senmastra nekulturejo, pri kiu ĉiuj kredas sin kun rajto rikoltadi; kaj se krom ne edziĝi, nek havi idaron, oni ne lasas sin ekspluati de ĉiuj, bonan famon oni ricevas, kiel nekortuŝebla egoisto! Nur ni, kiuj ne havas idojn, povas taksu kiel multe valoras kontraŭ petemuloj la solena protesto de familiestro: «Mia amiko, mi havas idojn...» Per tio, kion kostis al mi ne ilin havi, mi povus esti subteninta du dekduojn.

MAR. Kial vi ne edziĝas? Vi ne scias, kiom mi ĝojus vidante vin edzigitan. Mi diras ĝin kiel mi sentas... Kaj ankaŭ Jozef Ludoviko tre ĝojus... Diru al mi... Ĉu vi neniam trovis en la mondo ian virinon, kiu milde vin kortuŝante, igis vin pensi... kun tiu ĉi virino mi vivus feliĉa!... En viaj vojaĝoj kaj senĉesaj ekskursoj vi neniam trafis plaĉan lokon, kie ŝajnas, ke nur ĝin rigardante la koro kvietiĝas pri siaj deziregoj?... Nu, kunigu en via penso tiun virinon kaj tiun ĉi lokon; kaj atente pripensu, kiel feliĉa vi estus pretigante kun ŝi vian amneston en tiu plaĉa anguleto ..

EMAN. Mi veturis preskaŭ ĉiam en ekspresa vagonaro kaj senhalte preterpasis... la lokojn kaj la virinojn!...

MAR. Se mi konus iun! Mi devas serĉi... Ĉu vi donas al mi permeson?

EMAN. Tiujn ĉi aferojn oni ne serĉas, sed oni trovas!

MAR. Cu vi intencas ĉi tie resti ankoraŭ longe? Eĉ multe defendante tion ĉi, vi ja estas laca... Tiu ĉi nia vivado!... La karaktero de Jozef-Ludoviko!...

EMAN. Ĉu vi kredos ĝin?... Eĉ tio min distras la malkonsentoj kaj malpacetoj kun mia kara frato... Bedaŭrinda Jozef-Ludoviko! Malgraŭ ĉio mi lin amas. Li estas dorlotata infano... Li ĉiam havis iun, lin dorlotantan... Feliĉa li! Liaj petolaĵoj estas infanaj; li estas pliĝa, ol mi, kaj mi traktas lin, kvazaŭ li estus plijuna frato. Mi uzas por li la sentojn de patreco, kiuj ekmontriĝas ĉe mia aĝo... Oni sentas deziregon protekti, direkti estaĵon pli malfortan... Kaj en tiu ĉi domo estas du, li kun sia senpacienco kaj egoismo de malsana infano; vi kun via nekvieteco kaj prizorgoj de amanta patrino... Mi estos la fortulo, la amo, kiu protektas kun energio, sen moleco... la patro... la bopatro, kio estos necesa... Kompreneble, se vi ne forpelas min el ĉi tie, kiel ĝenulon!...

MAR. Mi, ne, Emanuelo. Vi povas kredi ĝin.

EMAN. Mi havas mian planon. Tuj kiam la malvarmeo ĉesos kaj Jozef-Ludoviko aranĝos tiujn aferojn, ni faros vojaĝon, ĝi estas je mia kalkulo. Tra gajaj landoj de blua ĉielo kaj fajra suno, de floroj kaj kantoj... Tra Andaluzio, tra Italujo... Seviljo, Malago, Venizo, Napolo... kie ektagiĝas pli lume kaj vivo per si mem estas gajeco; kie la malriĉuloj kantas kaj la vento dolĉebruas kaj la maroj lulas... Landoj, kiujn Dio benas!... Kie eĉ pekado ne estas peko! Jen kion Jozef-Ludoviko bezonas por resaniĝi. Bano en pura aero saturita de lumo kaj gajeco... kaj

vi ankaŭ... kara infanino! por ke viaj okuloj akiru lumon kaj via brusto spiru sen premiĝo... sen larmoj, nek ekĝemoj... ĉar kun via malgaja beleco, vi ŝajnas al mi dolorata virgulino de tiu ĉi peniga kalvario de la vivo...

MAR. Ne logu la imagadon per tiel plaĉiga perspektivo... Mi bone scias, ke ĝi ne okazos. Jozef-Ludoviko ne estas malsana, nur kredas sin malsana...

EMAN. Vi ĝuste trafis!

MAR. Li estas nature malgaja kaj kontentiĝas per malgajeco... La lumo lin doloras!... Eĉ ne proponu al li tiun vojaĝon... Iru vi sola...

EMAN. (*Kun malvigleco*). Sola?... Sola, ne!

SCENO II

LA SAMAJ kaj JOZEF-LUDOVIKO (*Eniras sekrete*)

MAR. (*Renkontiĝante subite kun li, ektimigita*). Ve!

EMAN. Jozef-Ludoviko!

JOZ. Ĉu mi ektimigis vin?

MAR. Vi eniris subite... Ĉu vi ne sonorigis?

JOZ. Juljano estis eliranta...

MAR. (*Flanken*). (Ne estas dubo, li kunportas ŝlosilon por eniri neaŭdate... Kion li suspektas de mi? Dio mia!)

EMAN. (*Al Jozef-Ludoviko*). Kontraŭ vi... ne, pli bone, por vi ni estis konspirantaj...

JOZ. Jes, mi jam rimarkas, ke vi estas ĉiam kune... en konspirado, videble.

MAR. (*Flanken*). (Lia suspekto estas terura! Mia koro

indignas... ĝi jam estas kolero, pli ol malĝojo, kion mi sentas...)

EMAN. Ni havas planon...

JÓZ. (*Sajnigante gajecon*). Ĉiu unu planon, aŭ ambaŭ la saman?... Ĝi estas kurioza, hodiaŭ ni ĉiuj donis nin al la farado de planoj... Mi havas alian.

EMAN. Ni vidu.

JÓZ. Ne. Ni vidu unue la vian. Mi ne volus, ke la mia ĝin malaranĝu,

EMAN. La afero estas pri vojaĝo...

JÓZ. Pri vojaĝo?... Ĉu oni devos do kredi pri tio, kion oni nomas sugestio en malproksimeco? Pri vojaĝo ankaŭ estas mia plano... (*Firme*). Tiun ĉi semajnon mi veturos Parizon kun Mario.

MAR. (*Flanken*). (Li malkonfidas pri mi! Li volas min disigi de sia frato!...)

EMAN. (*Kun esprimo de strangeco*). Tiun ĉi semajnon?...)

JÓZ. Oni parolis al mi pri negoco en projekto... Mi iros ĝin studi, kaj okazokapte mi plenumos mian promeson al Mario.

EMAN. Mi kredis, ke vi iros ripozadi. Vojaĝo por negocoj... ne penindas!...

JÓZ. Mi bedaŭras vin forlasi... Sed vi ja scias, ke vi povas restadi ĉi tie tiom longe, kiom vi volos. La domo estas je via dispono.

EMAN. (*Seke*). Dankon. (*Flanken*). (Li min elpelas de ĉi tie... mi ne volus kompreni kial!)

MAR. (*Ne povante sin deteni*). Tiel urĝa, do, estas tiu vojaĝo? Ĉu ni ne povus atendi?

EMAN. (*Helphante*). La Pariza klimato en tiu ĉi sezono ne estas tre favora al via malsanado.

JÓZ. (*Suspekteme*). Estas sprite! Vi senĉese disputas

por ke mi lasu miajn aferojn, foriru de Madrido kaj penu min distri... kaj nun kiam mi jen proponas tion, ĝi malplaĉas al vi kaj vi kontraŭstaras.

MAR. (*Protestante*). Kontraŭstari? Ne.

JOZ. Kia estis via plano? Tiu plano, kiun vi estas kombinantaj tagojn kaj tagojn, en longaj sekretaj interparoloj...

MAR. Sekretaj, ne... Ciu ajn povas ilin aŭdi. Emanuelo proponis vojaĝon tra Italujo...

JOZ. (*Intence*). Li povas ĝin fari.

EMAN. (*Decide*). Mi ekveturos hodiaŭ vespere.

MAR. Ĉu vi foriras?

JOZ. Li jam restis longe ĉi tie... Li eble enuas.

MAR. Sed hodiaŭ vespere... tiel, subite.

EMAN. (*Al Mario*). (Mi foriras, antaŭ ol oni min elpelos).

MAR. (Li komprenis!... Mi mortas pro honto!)

EMAN. Mi iras pretigi ĉion... Baldaŭ mi lasos vin trankvilaj. (*Eliras*).

SCENO III

JOZEF-LUDOVIKO kaj MARIO

JOZ. (*Gaja kaj animita kvazaŭ li estus formetintan de si ŝarĝon*). Tiel ni povas forveturi sen zorgo... Ni luos domon en Parizo... ni povas konduki tien la servistoj... Vi vidos, kiel tie ni iros ĉiuloken, al teatroj, al festoj... kiaj estas tiuj teatroj! Kia luksol!... Vi ja vidos... Kaj por vi, virinoj, tie estas pli da ĉarmoj, la vendejoj, la bazaroj... Ĉu vi ne aŭdas min?... Ĉu vi estas

malgaja?... Ĉiam malgaja kun mi!... Cu malplaĉas al vi la vojaĝo?... (*Senpacienca, kun mildeco*). Kion vi bedaŭras lasi? Kial vi estas malgaja?

MAR. Jozef-Ludoviko, ĝi estas terura, kion vi faris!... Unuafoje mi hontis pri io! Via frato komprenas, ke vi estas ĵaluza... Kion li pensos pri mi? Ke mi estas tia virino, pri kiu oni povas suspekti tian malgloron? Cu vi pensis pri tio?... Vi ne pensis, same kiel vi ne vidas, ke de kelkaj tagoj mia vivo estas infero, ke mi sentas min mortanta... ke mi ne povas plu!

Joz. Kie ne estas kulpo, ne estas malkonfido, ke oni ĝin suspektu. Se Emanuelo komprenas, kio okazas ĉe mi... li antaŭe estas kompreninta kio okazas ĉe li.

MAR. Vi estas blinda, Jozef-Ludoviko, vi estas freneza! Kiel naskiĝis ĉe vi tiu suspekto?... Nur en ĵaluza deliro vi povis suspekti pri via frato... Sed pri mi? La ofendo estas tiel kruela, ke eĉ kredante ĝin frenezaĵo, mi ne povas ĝin pardonil! Kian malsaĝaĵon, kian nesindetenon, kian facilanimaĵon almenaŭ vi vidis en mi, por kredi ĝin ebla?... Tian estimon mi meritis de vi?... interŝanĝe de tio, ke mi dediĉis al vi mian tutan vivon!... Kaj mi ja nur vivis por vi? Ĉu oferita?... Ne, ĉar amo neniam sin oferas... plaĉigita, ĉar mia sola feliĉo estis vidi vin feliĉa apud mi... kaj mi ne sukcesis! Vi neniam estis! Ĉe kio estis por mi plaĉa devigo, farita sen peno, vi vidis malvolontan submetiĝon. Ĉu vi pensis, ke amo nur povas vivi kaj ĝui en vivo de festoj, de plezuroj, kaj ke mia amo ne povos daŭri alimaniere? Ĉu vi ne vidis en mi plaĉon?

Ĉu vi ne vidis virtecon?... Tiel, do, mi estis por vi la sklavino perforte submetita, ne la virta edzino, la edzino kristana... kiu eĉ nun, vidanta rompitan la aman kunligon, humiligita, ofendita... estos fidela, estos honesta... Ĉar mia patrino, honesta, kristana kiel mi, sciis enigi en mian animon, per la varmeco de preĝoj kaj kisoj, senton pli profundan, ol ĉiuj korinklinoj, ol ĉiuj homaj pasioj... Sanktan timon antaŭ Dio! Kaj se eĉ ĝi mankus al mi, la rememoro pri mia patrino min savus... Je Dio kaj je mia patrino mi estas honesta!

Joz. Vi estas, jes! Mi ne povus ne kredi tion! Por vi ne estis ofendo... Ĝi nur estas, ĉar mi scias kiel multe vi valoras kaj mi kiel malmulte... Mi scias, ke mi ne meritas vin kaj mi timis, ke oni rabu al mi vian amon... Vi ne scias, kiel mi vin amegas! Neniam mi sciis tion diri al vi!... Mi estas tiaspeca... Mi volus, ke neniu konu kiom vi valoras... eĉ vi mem ne!... Tial mi neniam diris ĝin al vi... ke nur mi vin amu.. kaj nur al mi vi ŝuldu amon!... Egoismo, jes... sed por mi ja nur via amo estis en la mondo!... Malkonfido pri mi, jen kio estis mia ĵaluzo... Mi ne devis dubi, mi scias, ke ne... Pardonu... Ĝi estas mia malbeno: dubi pri ĉio...

MAR. (*Kompatanta lin*). Jozef-Ludoviko, vi portas malamon en la koro, kiu malfeliĉigas vian vivon.

Joz. Pro Emanuelo, jes!... Li estas kulpa!

MAR. Li ne estas kulpa.

Joz. (*Ne aŭdante ŝin, fundesplorante en siaj rememoroj*). Ĉiam apud vi!... Instigante vin kontraŭ mi, akrigante senĉese sian spriton por min

malkaŝe pikkritiki!... kaj vi aŭskultanta lin en ravo... (*Ekmoŝo de Mario*). Kaj ĉiam kunel!... Kiam mi eliris, eĉ unu solan fojon, revenante, mi ne vidis tion, ke li estas en via ĉambro... kaj la interparolo estis daŭrinta longe... Ĉiam restis tri aŭ kvar finoj de cigaroj en la cindrujo...

MAR. Eĉ tion pririmarkis via ĵaluzo!

Joz. Mi ĉion pririmarkis!... Emanuelo vin amas... li estas deloganto, li estas cinika... multaj skandaloj estas en lia vivo... Li malvarme subfosas, atendas... Eĉ nun, se vi rememoras liajn interparolojn kun vi, vi rimarkos malicajn frazojn, kiujn vi ne atentis antaŭe... Certe, li parolis al vi pri amo... rimarkigis vin pri la unutoneco kaj malgajeco de nia vivo, parolis al vi pri aliaj ĝuoj, pri aliaj emocioj... pri arto, pri vojaĝoj... metis romanojn en viajn manojn, por ke ili parolu por li pli elokvente... Li starigis sieĝrondon ĉirkaŭ via spirito, por vin almiliti... Pripensu, rememoru.

MAR. Ne, mi ne trovas lin kulpa; eĉ reserĉante plej multe... Li ĉiam traktis min, kiel fratinon. Vi estas nejusta kontraŭ li, Jozef-Ludoviko, unu fojon ankoraŭ mi diras al vi tion.

Joz. Nur ĉar vi lin amas malgraŭ vil... Car li subjugigis vian imagadon, vi lin komparis kun mi... Li estas juna, belsintena, komplezema, viglespita... Malgraŭ vi mem, vi komparis lin kun mi!... Malgraŭ vi mem vi bedaŭris, ke el la du fratoj mi ne estas tiu, kiu venis el malproksime!... Eble la ideo pri mia morto... mi estas malsana... se vi estus libera, ho! mi estas certa, ke vi ambaŭ pensis tion... vi kaj li kiel mi estas ĝin pensinta... Jes, jes .. Li kontraŭ mi, mi apud

vi... Eĉ kontraŭvole oni ne povas tion ne pensi!

MAR. Jozef-Ludoviko! Tio estas jam frenezo. Se vi tiel parolas, mi kredos, ke vi estas malsana, kaj kiel malsanan oni devos vin trakti.

Joz. Malsana? Ĉu vi diras freneza? Ho se tio feliĉe estus!... Pro kompatato vi estus dononta al mi la amon, kiun mi perdis... Ne, vi ne povas min ami! Malfeliĉo mia! Malgraŭ ĉio mi volas por mi vian tutan amon kaj ĉiufoje mi pliperdas ĝin!... Pardonu al mi Mario! Kompatu min! Se mia amo estas amo, ĉar ĝi estas amo; se ĝi estas frenezo, ĉar ĝi estas frenezo,... ĉiel mi bezonas vian amon... Vi estis la sola amo en mia vivo!... Se mi sciis, ke mi estas perdinta vin por ĉiam, ke mia vivo estas malhelpo por la via... ke sen mi vi estus feliĉa... Mi sen ia ajn dubo min memmortigus... kaj sen tio, ke vi ĝin suspektu por ne lasi al vi konsciencan riproĉon ĉe via feliĉeco!... (*Ploras*).

MAR. Ploru, Jozef-Ludoviko! Ploru! La larmoj malpremas la koron.

SCENO IV

LA SAMAJ *kaj* EMANUELO

EMAN. (*Parolante kun Fuljano ĉe la pordo*). Jes, reprene ĉion. Sendigu ĉion al la hotelo... Mi tuj iros... (*Alproksimiĝante*). Mi decidis mian foriron... Mi venas diri al vi adiaŭ, (*Kortuŝita*), danki vin por ĉio... peti de vi pardonon...

Joz. (*Decide*). Emanuelo... ĝi ne estas mia kulpo.

Nia situacio estis premembarasa. Juna, fraŭla, fama pro viaj aventuroj, suspektinda pro via pasinta vivo; via restado ĉe mi okazigis primurmurojn... La mondumo malbonintence pensas... ili venis ĝis mi... Via akurateco por mia edzino, viaj donacoj, estis celo de komentarioj, kiujn mi ne povis toleri. La honoro de Mario estas por mi super ĉio... Dum mi ekzistos, neniu, per ia okazo, suspektos pri ĝi; kiu ajn ĝi estos.. Ne ŝajnu al vi strange, ke mi ne vin detenas, ke mi lasas vin tiamaniere eliri el mia hejmo. Feliĉe por vi, pri nenio vi min bezonas... mi ankaŭ ne, vin... Estu tre feliĉa. El tuta koro mi deziras al vi tion!

EMAN. (*Kun subita impulso*). Ho, ĝi ne povas esti! Mario, lasu nin solaj... Mi havas ion por diri al Jozef-Ludoviko... Mi ne povas foriri, ne parolinte kun li... (*Mario alproksimiĝas al Jozef-Ludoviko kvazaŭ rifuzante ilin lasi solaj*).

Joz. (*Al Mario*). Lasu nin... Mi estas trankvila... Pli bone estas paroli malkaŝe.

SCENO V

JOZEF-LUDOVIKO kaj EMANUELO

Joz. Parolu! Diru ĉion, kion vi havas por diri al mi. Mi aŭskultas trankvile.

EMAN. Mi ja ne scias kion diri al vi! Mi ja ne scias kio okazas ĉe mi de kiam mi vidis klare en via koro!... Mi volis kredi tion ridinda, kiel strangajon de via karaktero... sensenca ideo, kiu trafapris vin dum ekskuo de viaj nervoj, sen via

konscieco... Sed fosi en la suspekton kaj spioni nin... kaj ĝisveni al tio: kredi ĝin certaĵo... Turmenti tiun kompatindan virinon!... Kiajn inferajn nigraĵojn vi portas ĉe vi, kiuj ĉion mallumigas?... Je kiaj malhonoroj vi estas kapabla, kiu kredas ĉiujn eblaj?...

Joz. (*En freneza nesinregeco*). Ne ekzistas malhonoro, je kiu mi ne kredas kapabla tiun, kiu naskiĝis en ĝi!

EMAN. Kion vi diris?... Ripetu tion, kion vi diris!... Kiu naskiĝis en malhonoro?

Joz. Se vi min malamas, kiel mi vin, se vi malamas la memoron pri mia patro, kiel mi pri la via... mi diris sufiĉe. Kiu uzurpis naskiĝante nomon kaj heredon, tiu ja povas esti kapabla konduki alian fojon en mian hejmon la malhonoron kaj la malgloron... vi jam aŭdis. Eliru el mia hejmo.

EMAN. (*Detenante sin kun granda peno*). Malfeliĉulo! Ĉu vi tion diris?... Ĉu vi ĝin pensis?... Nu, se tra miaj vejnoj fluus sango fremda al via... nur unu sola guto... vi ne dirus tion!... Frato, frato! Vi estas, jes! Neniam tiu ĉi vorto eliris tiel profunde el la koro, kiel ĝi nun eliras por defendi kontraŭ vi, kontraŭ ŝia filo, la honoron de nia patrino... Ho, kompatinda frato! Mi diras al vi: frato! Nun ja mi sentas por vi kompaton... Dubi pri via patrino! Dum tuta vivo premvolvita ĉirkaŭ la koro tiu suspekto, venenanta la sangon guto-post-guto!... Dubi pri via patrino kaj malami ĉe mi ŝian memoron! Jes, mi nun komprenas, kial vi ne povis esti feliĉa, kial via vivo estis ĉiama kondamno; sen fido pri amo, sen konfido pri korinklino, sen io el kio faciligas la premegantan ŝarĝon de la vivo.. Mi re-

diras, ke mi vin kompatas, ke mi nun vin amas, kiel mi vin amis neniam... Eterna kondamnito de infera dubo... venu al mi, venu!... Mi ja iras vin savi! (*Altirante lin al si kaj lin karesante.*)

Joz. (*Disiĝante*). Ni finu. Estas neutile, ke ni turmentu nin. En subita senpenso mi diris... kion mi bedaŭras esti dirinta al vi. Sed vi postulis la kialon de mia suspekto... Mi ĝin donis jam al vi. Eĉ unu vorton ne plu... se vi ne volas ke tiu vorto montru al vi la ekziston de kulpo, kiu por vi, feliĉe, ne ekzistas.

EMAN. Ĝi ne ekzistas, ne! Mi ja konas la historion, mi ja scias al kiu ĝi rilatas... al don Gabrielo, mia protektanto.

Joz. Via patro!

EMAN. Kiel feliĉe, se vi estus prava! Se mi estus povinta lin elekti, mi ne estus elektinta alian patron!... Sed aŭskultu: don Grabielo raportis al mi multajn fojojn la historion, la lastan fojon mortante, jam en agonio, kaj en tiu horo, kiam la eterneco malfermiĝas antaŭ ni, neniu mensogas. Kaj por kio mensogi? Mia koro lin respektegis ja, kiel patron! Nia patro ĵaluzis pri sia amiko, preskaŭ sia frato..., kiel vi ĵaluzis pri mi... Li dubis pri nia patrino, sankta, beninda... kiel vi dubis pri Mario... Kial? Ĉar lia egoismo, kiel la via, estis grandega... Ĉar via amo ne estas amo, sed avido; ĉiongluta, absorbanta impulso, kiu ne toleras volon, nek vivon proprajn en la avidita estaĵo, kiu sufokas kaj disfrakasas la nepropran impulson... Via egoismo estas tiel granda ke vi estas malvastaj por vi mem. Vi estas, kiel tiuj tiranaj al militantoj, avidaj pri

regopovo, al kiuj ne sufiĉas iliaj propraj posedajoj kaj rompas landlimojn por vasaligi la tutan mondon, se nur ili povus... Tio estas por vi ami! Plivastigi viajn regitlandojn... Tiel amis nia patro, tiel vi amas.. Kion vidis nia patro en la interrilatoj de don Gabrielo kun nia patrino?... Kion vi vidis inter Mario kaj mi... mildan simpatian de du koroj puraj, honestaj; la inklinon per kiu la noblaj animoj salutas unu la alian dum ekkonatiĝo. Kun sindono, kun entuziasmo? Kompreneble! Tra tiuj ĉi maroj de la vivo, inter riskoj kaj ventegoj, oni salutas tiom da kaperistaj ŝipoj, tiom da fremdaj flagoj, ke ekvidante en maro, malproksime de bordo, nian standardon, ni metus la koron, kiel flagon, por respondi la saluton... Nu, la personoj ankaŭ portas sian standardon, kaj la koro avizas al ni, kiu estas kaperista, kiu estas fremda, kaj kiu estas la nia kaj kiel nian ni devas respondi. Ĝustrilate don Gabrielo ĉiam venigis tiun ĉi komparon, kaj ĝustrilate, mi nun venigis ĝin. Don Gabrielo sentis por nia patrino.. li ĵuris tion je ŝia memoro, puregan inklinon, tiel nematerian, tiel nepridireblan, ke eĉ ĝi ne povis havi nomon! Fervoro de kredanto, entuziasmo de artisto, la plej alta eco de la animo, ĝia esenco... tio estis lia pasio... amo, se vi volas doni al ĝi nomon, sed amo, kiu oferas sin al si mem; amo, kiun oni ne povas konfuzi kun egoismo.

Joz. Kiun vi ankaŭ sentis por Mario?

EMAN. Kiun don Gabrielo sentis por nia patrino... Kiun mi sentas, jes! Mia patrino kaj Mario bone povas kunesti en rememoro! Mortante li kon-

fesis al mi lastafoje la historion pri la sola amo de sia vivo... Li sciis, ke mia patro dubis pri la virteco de nia patrino, ke pro tio li neniam min amis, kiel filon. Li timis, ke iu, ĝi devus esti vi! metos iam en mian koron la teruran dubon pri la honoro de mia patrino... kaj li volis, ke mi eksciu la veron... kaj la veron mi diris, kiel li ĝin diris... Tiu viro neniam mensogis!

Joz.

(*Batalante kun si mem*). Ne, mi ne povas!... Kion mia patro diris, tio ankaŭ estas sankta por mi... Evidenteco pri la suspekto, kune kun rememoro el mia infaneco, kiu venenis mian vivon por ĉiam, kiu per unu fojo elsekigis en la koro la naivecon de la mia, la iluziojn de la juneco, maljunigante min en unu momento. Malbeninda kiso!

EMAN.

Ĉu kiso? Donita kun patra fervoramo, mi sentis ĝin milfoje sur mia frunto!... Ĝi estas la sama, kiun don Gabrielo donis al nia patrino, en la momento kiam ili disiĝis... kiam doloregitaj de korpreniĝo, ili sentis sin kunigitaj de la suspekto en komuna malhonoro. Kaj antaŭ la virta konstanteco de la martira edzino, antaŭ la sankteco de la kalumniita virteco, tiu kiso, oferdono de admireco, la unua, la sola... purega, kiel la frunto de nia patrino, sankta kiel ŝia animo... Jes, mi portas ĝin tie ĉi, sur mia frunto... Mia nobla protektanto, mia vera patro, per ĝi ellasis sian animon... Mia patrino estis mortinta nelonge antaŭe, malproksime de mi... De via patrino kaj de mi!... li diris mortante kaj li kisis min sur la frunto... Kaj li mortis min kisante... Ĉu vi silentas? Ĉu vi kredas al la honoro de nia patrino? Ĉu vi kredas,

ke la sama senmakula sango fluas tra niaj vejnoj... ke mi estas via vera frato?... Nu, unu ĉirkaŭpremon, frato... kaj adiaŭ por ĉiam! (*Ĉirkaŭpremas lin*).

LASTA SCENO

LA SAMAJ kaj MARIO

MAR. (*Tre kortuŝita*). Emanuelo! La manon... Unu kison! (*Kisas lin*). Tiel, sur la frunto... La kiso de via patrino!... Rigardu, Jozef-Ludoviko... (*Malcedante al lia rigardo*). Se estis ĉe ni kulpa pasio... mortigu min, dubu pri mi... dubu pri via patrino!

EMAN. (*Neniigita*). (Kio estas ĉi tio?... Kion mi sentis kiate? Ĉu estis kulpo ĉe mi?... Ĉu la ĵaluzo de mia frato vidis pli bone, ol mi mem en mia animo? Mi tie ĉi lasas la animon, disiĝante de ŝi!... Ĝi estis amo! Jes, la sola de mia vivo! Ŝin lasante, mi sentas, kion mi sentis neniam... Perfida koro!... Ho, for, for!) Adiaŭ! Estu tre feliciaj... Pardonu la transflugan birdon, se ĝi agitis la trankvilecon de via nesto...

Joz. (*Kortuŝita*). Adiaŭ, frato! (*Ĉirkaŭpremas lin*).

MAR. Adiaŭ! Ne por ĉiam...

EMAN. Por ĉiam, ne!... Ĝis kiam ni estos tre maljunaj, kaj ne povos resti malkonfidoj, nek suspektoj, inter ni... kiam ni ne povos dubi... eĉ pri ni mem... Tiam via frato revenos serĉi angulon por morti en la nesia hejmo.

FINO